

El la rusa poezio



El la rusa poezio

**Tradukis el la rusa
Valentin Melnikov**

**Literatura suplemento
al
*La Ondo de Esperanto***

**Kaliningrado
Sezonoj
2020**

El la rusa poezio

Kompilis: Valentin Melnikov kaj Aleksander Korĵenkov

Tradukis: Valentin Melnikov

Antaŭparolo: Aleksander Korĵenkov

Biografiaj notoj: Aleksander Korĵenkov

Redaktis kaj enpaĝigis: Aleksander Korĵenkov

Provlegis: Halina Gorecka

Sur la kovropaĝo: La 15-jara Puŝkin deklamas sian poemon antaŭ Gavrila Derĵavin en la ekzameno en la liceo en Carskoje Selo la 8an de januaro 1815.

(Pentraĵo de Ilja Repin, kreita okaze de la centjariĝo de la liceo en 1911)

Fonto: <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=551048>

Ĝi estas bitlibro (elektronika libro) eldonita laŭ la normo “pdf”.

Oni ne rajtas plene aŭ parte publikigi la tekstojn el ĝi papere aŭ elektronike sen la permeso de la tradukinto kaj de *La Ondo de Esperanto* (kiu volonte permesos kondiĉe de la mencio de la fonto).

El la rusa poezio / Kompilis Valentin Melnikov kaj Aleksander Korĵenkov; Tradukis el la rusa Valentin Melnikov; Antaŭparolo kaj biografiaj notoj de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2020. — 90 p. — (Literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, 2019).

© Valentin Melnikov, tradukoj, 2007-2015

© Aleksander Korĵenkov, antaŭparolo kaj biografiaj notoj, 2020

© Sezonoj, elektronika eldono, 2020

Antaŭparolo

Daŭrigante la tradicion de ĉiujaraj literaturaj suplementoj, la redakcio de *La Ondo de Esperanto* proponas al vi, kiel suplementon por la 2019a jaro, la kolekton *El la rusa poezio*. Ĝi entenas 101 verkojn de 22 aŭtoroj ekde Miĥail Lomonosov ĝis Konstantin Romanov. Temas pri kronologie ordigita kolekto de poemoj, laŭ kiuj oni povas vidi la iom-post-ioman evoluon de la rusa poezio: klasikismo, sentimentalismo, romantismo kaj realismo.

Ĉi tiuj poemoj aperadis dum ok jaroj ekde julio 2007 ĝis aŭgusto 2015 en la rubriko “Rusa Antologio” de *La Ondo de Esperanto*. Aldone estas enmetitaj kelkaj tradukoj, kiuj pro lokomanko ne povis esti presitaj en la papera *Ondo*.

La proponata poemaro tute ne pretendas esti neta antologio de la rusa poezio por la pritraktita 150-jara periodo, ĉar la elekto de la poemoj neeviteble respegulas la literaturan guston de la tradukinto Valentin Melnikov. Pro tio oni trovas en ĉi tiu volumo, ekzemple, pli multajn humuraĵojn, satirojn kaj epigramojn, ol kutime estas en similaj antologioj de la rusa poezio. Sed tio tute ne senvalorigas ĉi tiun eldonaĵon, kiu je la nuna tempo estas la plej reprezenta antologio de la rusa poezio en Esperanto.

Ĉiu ĉapitro estas garnita per portreto kaj konciza biografia noto. En ĉi tiuj notoj ni markas la akcenton en la nomoj per akuta supersigno super la akcentenda vokalo; la ruslingvaj nomoj estas prezentitaj en la nuntempa rusa ortografio. La vivojaroj estas indikitaj laŭ la Gregoria kalendaro (ekzemple, Nekrasov mortis la 27an de decembro 1877, do la 8an de januaro 1878).

Ni dankas al Valentin pro lia diligenta kaj talenta laborado, kaj esperas, ke vi ŝatos la frukton de ĉi tiu laborado.

Aleksander Korĵenkov



Miĥail Lomonosov

“Li kreis la unuan universitaton. Pli ĝuste, li mem estis nia unua universitato”, — skribis Puŝkin pri Miĥail Vasiľjeviĉ Lomonosov (Ломоносов, 1711-1765). Naskita en norda fiŝista vilaĝo en Arĥangelogoroda gubernio, li en 1730 senpermeso iris al Moskvo kaj studentiĝis tie en la Slava-Greka-Latina Akademio (universitato fondita en 1687), poste en la Kieva Mohila Akademio, en la Universitato ĉe la Akademio de Sciencoj kaj Artoj en Peterburgo kaj eksterlande.

Danke al la akiritaj scioj Lomonosov iĝis la unua grava Ruslanda natursciencisto, kreinto de la unua kemia laboratorio en Ruslando, iniciatinto de la Moskva Universitato, kiu nun portas lian nomon, historiisto, astronomo (en 1761 li malkovris la atmosferon en Venuso), akademiano...

Lomonosov estas konsiderata kiel konstituinto de la rusa literatura lingvo, kreinto (kun Vasilij Trediakovskij) de la rusa silaba-tona versfarado. Kun Trediakovskij, Antioĥ Kantemir kaj Aleksandr Sumarokov, Lomonosov fondis kaj fortikigis la rusan klasikismon — la unuan rusan literaturan skolon. Odoj famigis lin, sed interesaj estas ankaŭ liaj satiroj, dramoj kaj etaj poemoj originalaj kaj tradukitaj/reverkitaj, el kiuj ni proponas tri jenajn:

Per sia traduko de *Formiko* el Marcialo li defendis la organikan devenon de sukceso. Scienc-rilata estas ankaŭ la dua poemeto, en kiu Lomonosov versigis la konatajn vortojn komparantaj la funkciajn rolojn de la Tero kun tiu de rostata birdo el *La ŝtatoj kaj imperioj de Luno* (1649, publ. 1662) de Cyrano de Bergerac. La tria estas libera traduko de *Al cikado* de Anakreono, al kiu Lomonosov aldonis version, en kiu li aludas sian malfacilan situacion inter la scienco kaj la potenco.

* * *

En popla ombro promenante, formiket'
Al guto da rezin' gluiĝis per pied'.
Por homoj dum la viv' ĝi estis bagatela,
Postmorte en sukcen' estiĝis jam juvela.

(1747)

* * *

Du Astronomoj venis kune al festen'
Kaj ardis en disputo sen interkompren'.
Unua diris: "Ter' la Sunon ĉirkaŭiras";
Alia — ke la Sun' kun si planedojn tiras.
Jen estis Kopernik', alia — Ptoleme'.
Ridete kuirist' decidis per ide'.
Demandis mastro lin: "Ĉu vi la stelojn konas?
Do diru, kiel vi pri tiu dub' rezonas?"
Respondis tiel li: "Ke pravas Kopernik',
Mi pruvos sen viziti Sunon, por eksplik':
Ĉu aŭdis iam vi pri kuiristo-dupo,
Ke turnus fajron li ĉirkaŭ viand' aŭ supo?"

(1761)

**VERSOJ, VERKITAJ DUMVOJE AL PETERHOF,
kiam mi en 1761 veturis por peti subskribi privilegion
por la Akademio, provinte multfoje pli frue la samon**

Lokusto kara, kiom estas vi beata,
Ke pli ol homoj per feliĉo vi dotata!
Pasigas vivon vi en sin' de mola greso
Kaj ĝuas roson mielgustan vi sen ĉeso.
Kaj kvankam iuj taksas vin estaĵo por neni',
Sed en la pleja ver' vi reĝas antaŭ ni:

Anĝel' en korpo, eĉ senkorpa vi, en vero!
Saltadas, kantas vi sen zorgoj, en libero;
En ĉiu tera lok' vi propran hejmon havas;
Nenion petas vi, ne ŝuldas, ĉiam pravas.

(1761)



Aleksandr Sumarokov

Aleksándr Petróvič Sumarókov (Сумароков, 1717-1777) naskiĝis en aristokrata armeana familio, studis en la Suboficira Lernejo en Peterburgo (malgraŭ ĝia modesta titolo, ĝi donis bonan kleron al nobeloj, kaj multaj estontaj poetoj studis en ĝi), karieris ĝis brigadestro, poste dediĉis sin al politiko kaj kulturo. Implikita en intrigoj, skandaloj kaj diboĉoj, fine li bankrotis kaj mortis en sia eksa domo, jam ne apartenanta al li.

Sumarokov estas unu el la kunfondintoj de la rusa klasikismo. Sed dum Lomonosov famiĝis per odoj, la kreado de Sumarokov estis pli vastgama. Li verkis la unuajn rusajn tragediojn (entute, naŭ), pro kiuj li ricevis la krom-nomojn “la norda Racino” kaj “la patro de la rusa teatro”, dek du komediojn, dek satirojn, pli ol tricent fablojn, multajn epigramojn, cent kvindek amkanzonojn, plurajn eklogojn kaj la unuajn rusajn elegiojn.

La vorto “unua” ne estas evitebla ĉe la prezentado de Sumarokov. En 1756 li iĝis la unua direktoro de la Ruslanda Teatro, kaj en 1759 li fondis la unuan privatan Ruslandan revuon *La laborema abelo*, kiu estis ankaŭ la unua literatura revuo en la rusa lingvo. Ne estis lia kulpo, ke nur kvin jarojn li direktis la teatron, kaj ke nur unu jaron la *Abelo* zumis...

Krome, li profundigis la rusan poetikon, aldonis al la Lomonosova “ŝtata sublimo” simplecon, naturecon kaj klarecon de la poezia lingvo, kaj riĉigis la rusan poezion per pliaj metrikaj rimedoj.

STRIGO KAJ RIMULO

Ekfanfaronis Strig'.

La sango bolis pro fier', malic' konstantis.

Jen liaj vortoj por instig':

"Unua inter birdoj mi ĉi-boske kantis,

Sed nun pro tio mi — kun mia vana plor' —

Post kantoj estas el la bosk' ĵetita for:

Pro dolĉa voĉo mi dolorojn suferantis".

Respondis al la Strigo iu Versplektant',

Rimul' de ĉia vant':

"Frateto! Saman mi honoron ja akiris,

Ke la unua en la urb' per rimoj ekdeliris".

(1752)

EPIGRAMOJ

Kartludis frat', fratin' ne povis ne sopiri,

Por bridi lin, komencis ŝi admonojn diri,

Ja tage-nokte li disipis sen ĉagren'.

Vi jam malgajnis, frat', duonon de l' bien'!

Fratin' ludanton skoldis kun demand' ĉagrena:

"Ĉu iam trovos vi ludadon abomena?"

Replikis frato: "Se rezignos vi pri am',

Fratino kara – tuj mi ĉesos ludi jam,

Kaj poste vivos ambaŭ ni laŭ bona sorto".

Respondis la fratin': "Disipos vi ĝis morto!"

(1755)

* * *

Ŝi forte amas vin, kaj vin obeas ŝi,

Sed estas tridekop' — ŝi ilin amas pli.

(1756)

* * *

Ŝi estas via nun, sed ja ne por ĉiam':
Dum ne renkontis homon, indan je la am'.

(1756)

* * *

Tutkore amas mi, kaj brulas en pasi',
Nur tamen ne al vi.

(1756)

* * *

Milon' por longe de l' edzino forveturis,
Sed por adiaŭ diri, baldaŭ reen kuris.
Eĉ ne supozis ŝi en tristo kaj angor',
Ke li revenos hejmen post nelonga hor',
Tri horoj je semajn' impresis ŝin subite,
Kaj pro sopir' — alian ŝi akceptis lite.
Vidinte l' gaston, la veninto preskaŭ svenis.
L' edzino kriis: "Edzo, kio vin ĉagrenis?
Pasiojn bridu vi kaj regu vin sentime:
Kun li mi korpe estas, sed kun vi anime."

(1756)

* * *

Vidvino plendis pri ofendo de l' honor',
Sed sciis la juĝist' pri vera ŝia mor'.
Demandis: "Kiel?" — "Ĉe najbar' en tago nuna, —
Rakontis ŝi, — okazis babilado kuna.
Gastin' mensogis tie krude, en maldec',
Ke mi kvar idojn kvazaŭ naskis dum vidvec'."

Juĝisto diris do: "Neglektu ĉi malbonon;
Jen tia mondo, ĉiam plusas ĝi duonon".

(1756)

GLORO

Homo, rememoru plu,
Ke nelongas vivo-flu'.
Forpasos la riĉec', amuzo kaj honoro,
Kaj restos en la mondo sole via gloro.

(1759)

VULPO KAJ DORNARBUSTO

Jen staris Dornarbust'.
La Vulp' friponi kutimiĝis,
Kaj plej spertiĝis.
Sciencon de ŝtelado regas li kun ĝust'.
Samkiel filo hunda
Sciencon pri forbar',
Aŭ oficulo sen honest' profunda.
Allogas Vulpon dolĉaj beroj sur branĉar',
Kaj provas kapti li branĉetojn man-etende —
Samkiel oficist' al koruptaĵ' pretende.
L' Arbusto plene
Provizis sin kaj bere, kaj alene,
Kaj pikas. Vulp' koleras multe,
Ke liaj provoj fiaskadas senrezulte.
La Vulpo diras al Arbusto: "Ho kanajl!
Vi min pikadas pro malico, kvazaŭ najl!"
Respondis la arbust': "Insulto ne efikas:
Ne mi vin pikas, vidu, sed vi mem vin pikas."
Legant'! Ĉu scias vi, por kio mia dir'?
Tielas Dornarbust', tutsamas la satir'.

(1760)



Miĥail Ĥeraskov

Miĥail Matvéjevič Ĥeráskov (Херасков, 1733-1807) estis filo de valaĥa nobelo, veninta al Ruslando por servi Petron la Grandan (kune kun la patro de la poeto Antioĥ Kantemir).

En la Oficira Lernejo (Peterburgo) li ekverkis poezion sub forta influo de Sumarokov, kaj post nelonga armea deĵoro li iĝis ŝtatoficisto, i.a., direktoro (1763-1770) kaj kuratoro (1778-1802) de la Moskva Universitato, kaj intertempe vicestro de Bergkolegio (ministerio pri minaferoj). Aktiva kleriganto kaj framasono, li eldonis la revuojn *Utila amuzo* kaj *Liberaj horoj*, proklamante en ili “la gloradon de l’ virtoj” la ĉefa celo de la arto.

Adepto de la rusa klasikismo, Ĥeraskov dum sia duonjarcenta literatura agado verkis ankaŭ lirikaĵojn kun elementoj de sentimentalismo kaj eĉ popolstilan mirfabelon. Famigis lin la heroaj poemoj *Rusujado* (dek mil versoj, 1779), *Renaskita Vladimiro* (1785) kaj *Caro, aŭ savita Novgorodo*, dramoj, komedioj, odoj, fabloj kaj mallongaj versaĵoj.

Agordas liron iuj
Por fami en la mondo
Kaj per ludado dolĉa
Parnasan kronon preni;
Aliun verskreado
Enuon peli helpas;

Kaj iu versojn kreas
Por skoldi pri malvirtoj;
Sed mi poemojn kreas
Kaj liron mi agordas,
Ke per muziko mia
Mi plaĉu al amata.

(1762)

ORO

Se volas vi — kolektu riĉon,
Konsolon faru por la kor';
Sed ne observas mi feliĉon,
Alian ulon tentu, or'!

Ĉu gloron mi per vi akiras?
Ĉu pace vivos sen envi',
Se laŭ destino mi sopiras
Kun vi tutsame kaj sen vi?

Per or' ne venas hom' amika
Al mi, nek saĝo, nek honor';
Ĝi estas monda plag' tragika,
Kaŝej' de morto kaj horor'.

Havanta oron hom' malbravas,
Konstante ĉion timas li;

Sed kiu oron ja ne havas —
Li malfeliĉas multe pli.

En or' serĉatas harmonio;
Havante oron — en sufer'
Ni dronas; plej mirindas tio!
Ho, kiom strangas hom', en ver'!

(1768)



Ippolit Bogdanovič

Ippolít Fjódorovič Bogdanóvič (Богданович, 1743-1803) devenis el malgrand-rusa (ukraina) etbienula familio. Same kiel Sumarokov kaj Ĥeraskov, li okupis kelkajn gravajn ŝtatajn postenojn (fine kiel la direktoro de la Ŝtata Arkivo); same kiel ili, li partoprenis en kortegaj intrigoj, estis framasono, verkis poemojn, fablojn kaj dramojn, tradukis kaj redaktis...

Sed, malkiel ilin, oni rememoras lin ne pro multaj verkoj, sed precipe nur pro unu poemo — *Duŝenjka* (1783), verkita surbaze de la antikva mito pri Amoro kaj Psiĥo, konata per *La ora azeno* de Apuleius kaj per *La amo de Psiĥo kaj Kupido* de Lafonteno. Bogdanovič en sia ĉefverko sukcesis ironie bildigi per versoj ne la historion de la diino, sed la aventurojn de koketa ĉarmulino, aldoninte iom da rusa folklora fono, per lingvo senprecedence leĝera en la rusa poezio.

Sed kelkaj el liaj mallongaj poemoj, jam preskaŭ forgesitaj, havas signifon ne nur historian, sed ankaŭ literaturan.

MONO

Ho ve, se mankas mon'; sed kiu fort' al riĉo
La homojn tiras? Velkas ja sen mon' feliĉo,
Kaj eĉ centjara vi enuos sur ĉi fon';
Dum pasas via viv' — ho ve, se mankas mon'.

Ho ve, se mankas mon'; kaj ĉie leĝoj regas,
Ke monon oni flatas kaj karese flegas.
Ho mono! Vin mondum' respektas laŭ impon'
Kaj ĉiu ĝemas ja: ho ve, se mankas mon'.

Ho ve, se mankas mon'; ĉar kurtas vivojaroj,
Feliĉon devas ligi ni al akaparoj;
La mono kreas multajn vantojn sen bezon',
Sed sen la vantoj estas plag', se mankas mon'.

(1761)

JEN SIGNO DE MALBON'

Se la amik'
Por via bono penas en komplik',
Kaj kaŝas tion vi de l' mondo —
Jen signo de malbon' do.
Sed en feliĉo de amoro
Alia estas la valoro;
Se vi ne kaŝas ĝin de l' mondo —
Jen signo de malbon' do.

(1763)

MODERECO

Pri l' viv' kontentas mi fiere,
Kaj jenas la konfirm' por mia opini':
Se ion mi ne havas vere,
Mi konsideras ĝin neni'.

(1763)

PRI MEMLAŬDADO

Raciajn agojn vi priridas kun rikan'
Kaj diras, ke pli saĝas vi ol multaj centoj;
Mi ne oponas: jes, pli saĝas vi, kompan',
Sed ne ol homoj, nur ol kvarpiedaj gentoj.

(1763)

PRI MALICDIRADO

De vi mi ĉie insultatas,
Kaj vi de mi sen ĉes' laŭdatas,
Sed la komuna plag' obsedas nin sen fin':
En ambaŭ diroj ja neniŭ kredas nin.

(1763)

VERSOJ PRI AMIKECO

Sen amikeco hom' aparte vidas sin,
Simila al ermito,
Treniĝas laŭ destin',
De ĝojoj senigito;
Sed per la amikec'
Multiĝas nia vivospec'.

Ho vi, ĉiela dono!
Per vi, ho amikec', feliĉas ni,
Per vi intima harmoni'
Al la sentivaj koroj venis por ekkono.
Por la anim' — kvieta rifuĝej',
Ho amikec'! Ĉi version finu inde plej,
Aperu vi kun rava brilo,
Konforme al utilo.

(1773)



Gavriil Derjavin

Gavriil (Gavrila) Románoviĉ Derjavin (Державин, 1743-1816) estas la lasta 18-jarcenta poeto en nia antologieto. Naskita en neriĉa nobela familio (probable el tatara deveno), li ricevis malbonan edukadon, soldatservis, kartludis kaj deliktis, sed post partopreno en la sufokado de la ribelo de Jemeljan Puĝaĉov (1773-1775) li rapide karieris: guberniestro en Tambov, senatano, ŝtatsekretario ĉe Katerina II, financministro de Paŭlo I, kaj justicministro de Aleksandro I. Sed “arda kaj diable verama” Derjavin ne povis longe resti en ĉiu el siaj postenoj...

Klel poeto, Derjavin malakceptis la poetikon de Sumarokov kaj konvertiĝis al Lomonosov, sed ties rekomendon uzi la “altan stilon” en odoj li baldaŭ forĵetis, ekuzinte en ili la ordinaran kaj eĉ la popolan stilojn (“aŭtun’ ... levinte jupon antaŭ ni, riverojn pluvus”). Lin famigis la odo *Felica* (1782), dediĉita al Katerina II, kaj preskaŭ ĉiuj liaj grandaj verkoj estis ligitaj kun tiutempa vivo.

Krom odojn (*Al regantoj kaj juĝistoj*, *Konkero de Izmail*, *Venkoj en Italio*, *Akvofalo* k. a.), tro longaj por nia rubriko, li verkis malpli longajn poemojn amajn, anakreoneskajn kaj satirajn.

REGULO POR VIVI

Al fierul' kliniĝu, flatu,
Skandalemulon vangobatu,
Grasumu de pordego foston,
En hundan buŝon ŝovu oston,
– Mi vetas sen erar',
Ke eksilentos ĉiuj kvar.

(ĉ. 1779)

PRI LAŬMODA SPRITO DE LA JARO 1780

Pensadi pri nenio, dubon ĉiam spiti,
Al ĉio doni tuj decidon sen heziti,
Sen multe da kompren', pri multo babiladi;
Arogi, sed scipovi per arogo flati;
Pliigi belan vanton, en palavro droni,
Al malamik', amiko per rigard' imponi
Per afableco brili, sed en ver' — ignori,
Stultulojn priridante, ilin ja favori,
Kaj ami laŭ profit', amiki laŭ selekto,
Kovardi en anim', fieri per aspekto,
El fremda konto vivi kun impres' nobela,
Stature gravi eĉ en kazo bagatela,
Por akra vort' ŝercadi ankaŭ pri justico,
Gepatrojn kaj eĉ tronon moki kun malico,
Resume, per supraĵaj diroj interveni,
De ĉiuj studoj sole florojn ŝire preni,
Dishaki nodon, se malligi ĝin ne scias —
Jen kion ofte ni je sprito opinias!

(1783)

MONUMENTO

Mi kreis por etern' mirindan monumenton,
Pli firman ol metaloj kaj antikva templ';

Ĝi kontraŭstaros tondron kaj kruelan venton,
Kaj ne detruos ĝin flugado de la temp'.

Ne tuta mortos mi, sed parto mia grava
Evite putron, vivos post la morta hor',
Kaj dum en univers' prosperos gento slava,
Kreskados ne velkante mia digna glor'.

Disiros fam' de l' Blanka ĝis la Nigra maro,
Super rivera flu' kaj kampa infinit';
Memoros ĉiu inter multa la homaro,
Kiel ricevis mi aprezon pro l' merit',

Ke plej unua mi per rusa vort' petoli
Aŭdacis, aklamante virtojn de l' reĝin',
La Dion kun tutkora simpla priparoli,
Al caroj diri veron sen humila klin'.

Ho Muzo, ekfieriĝu juste laŭ merito,
Se iu spitos vin — respondu per ignor';
Kaj propramane, trankvilema sen ekscito
Min kronu per aŭroro de senmorta glor'.

(1796)

AL MI MEM

Kial, kial mi tumultas,
Ŝarĝas min per ofcad',
Se la mondo min insultas,
Ke plej rektas mia pad'?
Do laboru iu kroma,
Multas saĝa sinjorar':
Estas propra bon' pordoma
Kaj enspezo por la car'.
Se mi senutile aĉas
Pro fervoro kaj verem' —

Al virinoj, muzoj plaĉas
De [Eroto] arda trem'.
Do kun li mi kamaradu,
Manĝu, dormu mi ĝis sat';
Jes, prefere mi pigradu
Ol suferu pro malŝat'.
En afer' ne estos brula,
Mi nur gastos ĉe la ver',
Iĝos oficist' skrupula,
Pli avidos je moner'.
Tiam ofte, dum matenos,
Ĉarma muzo logos min;
Poste mi en liton venos
Por brakumo de l' edzin'.

(1798)

RIĈECO

Se povus ni per riĉaĵaro
Mallongan vivon pli kaj pli
Daŭrigi sen eĉ ajna baro —
Do oron kolektadus mi.
Mi tenus oron akumule:
Se morto venos preni min,
Mi svingus poŝon senskrupule
Por lui vivon el destin'.
Sed se ne povas la trezoro
Aĉeti vivon po moment',
Do kial pro avid' je oro
Kvieton nian rompas tent'?
Ĉu ne pli bone estas — vervi
Festene kun amika hom';
Al junaj belulinoj servi
Sur molaj litoj, en arom'?

(1798)



Vasilij Ĵukovskij

Vasílij Andréjevič Ĵukóvskij (Жуковский, 1783-1852), ekstergeedza filo de la bienulo Afanasij Bunin kaj ties turka servistino Sajĥa, estis fariĝonta servutulo, sed lin adoptis seninfana nobelo Andrej Ĵukovskij, kaj danke al tio Vasilij nobeliĝis kaj ricevis bonan edukadon.

Ĵukovskij ekverkis jam en sia oka vivojaro, kaj en 1797 estis publikigita lia poemo *Maja mateno*. Unu el la fondintoj kaj kolonoj de la rusa romantikismo, li verkis kaj tradukis poemojn, baladojn kaj fabelojn, redaktis la revuon *Heroldo de Eŭropo*, recenzis kaj kritikis. La unua strofo de lia versaĵo *Gardu la Caron Di'*, muzikigita de princo Aleksej Ljvov, dum 1833-1917 estis la ŝtata himno de Ruslando.

Baldaŭ post la milito kontraŭ Napoleono, Ĵukovskij ekservis kiel instruisto ĉe la Imperiestra familio, kaj ekde 1826 estis “mentoro” de la tronheredanto, posta Imperiestro Aleksandro II. En 1841 li demisiis kaj iris al Germanio, kie li geedziĝis kun 19-jara Elizabeth Reiter. Li forpasis en 1852 en Baden-Baden kaj estis entombigita en Peterburgo.

Lia plej konata poezia verko *Svetlana* (1812) estas adapto de la balado *Lenore* (1773) de Gottfried August Bürger. Ĝia Esperanta traduko de Klara Ilu-toviĉ aperis en *La Ondo de Esperanto* (2005, N°12).

AMIKECO

Falinte de sur roka pec',
Per fulmoj frakasita, kuŝis kverk' en polvo;
Kun ĝi — hedera tig' en densa ĉirkaŭvolvo...
Jen vi, ho Amikec'!

(1805)

EPITAFO AL LIRIKA POETO

Pamfilo jen — de pompaj odoj la aŭtor'!
Pekulo tiu ĉi — pardonu Di-sinjur'! —
Postmorte vivi ja aspiris! —
Sed viva teren iris!

(1806)

EPIGRAMO

“Ĉu dramon verkis, Fefil, vi en ver’?” —
“Jes! Vere la sukces' perfekta! Ĉu vi kredas —
Neniu fajfis dum la scena premier’!” —
“Eh, Fefil! Kiel oni fajfus, dum oscedas!”

(1806)

AL ŜI

Kie nomo por vi?
Ne fortas la art' de mortuloj
Esprimi la ĉarmon de vi!

Liro mankas por vi!
Kial kantoj? Fuŝa resonas
De tarda babilo pri vi!

Se mia koro kapablus
Eksoni, do ĉiu sento
Estus la himno por vi!

Ĉarmon de via viv',
La imagon puran kaj sanktan —
Portas mi kaŝe en kor'.

Mi povas nur ami,
Sed diri, kiel amatas vi,
Povas eterne ja nura!

(1811)

MORTO

Stultulo diris tion kaj stultuloj trudas,
Ke morto kvazaŭ kreas plenen de horor'!
Dum vivas ni en mondo — ĝi nin ne apudas;
Sed se alvenis ĝi — do ni jam estas for!

(1814)

EPITAFO AL LUKSULO

Jen kuŝas delical' — li vivis sen modero!
Pro tio ŝuldis pli kaj pli!
Sed pagis li
La solan ŝuldon — al la tero!..

(1814)

LA GRANDA PENSO

La ran' ekpensis: Mi estiĝos kiel bov'.
Eĉ kvankam krevos mi — sed eminentas prov'!

(1814)

AL LA PORTETO DE GOETO

Por leĝo prenis li kuraĝon de liber',
Per ĉionvida penso super mondo brilis,
Konceptis mondon li ĝis lasta er' —
Kaj al nenio li humilis.

(1819)

REMEMORO

Pri la kunuloj karaj, kies vivoflu'
Por ni la mondon igis hele brili,
Ne diru kun sopir': "ne plu",
Sed kun dankemo: "estis ili".

(1821)

VENKANTO

Cent orharaj belulinoj
La turniron spektis digne.
Ĉiuj — kiel kampaj floroj,
Sole mia kiel rozo.
Mi rigardis ŝin kuraĝe,
Kvazaŭ aglo al la suno.
Kaj de miaj ardaj vangoj
Ekflamiĝis viziero!
Kiel strebis kor' penetri
Tra l' kiraso firma, peza!
Fajro de rigardoj helaj
Incendiis en animo;
La paroloj dolĉe-flustraj
Kirloventis en la koro;
Kaj ŝi mem — mateno juna —
Igis por mi fulmotondro;

Mi impetis, mi ekbatis —
Kaj nenio restis stari.

(1822)



Konstantin Batjuškov

“Kion mi diru pri miaj versoj? Mi similas homon, kiu ne venis al sia celo, portante sur sia kapo belan ujon, plenan da io. La ujo dekapigis, falis kaj frakasigis. Kiel eblas nun ekscii, kio estis en ĝi”, — diris la rusa poeto Konstantín Nikolájevič Bátjuškov (Батюшков, 1787-1855) en malofta momento de sia mensa resaniĝo...

Li naskiĝis en nobela familio en la urbo Vologda, studis en Peterburgo, kaj de 1802 (15-jara!) ĝis 1807 servis en la kleriga ministerio. En 1807 li armeaniĝis por partopreni la Pruslandan kampanjon kontraŭ Napoleono kaj estis grave vundita. Resaniĝinte, li daŭrigis militservi kaj kun la Ruslanda armeo venis en Parizon.

Batjuškov ekverkis frue, jam en 1809 famigis lin lia satiro *Vizio sur la bordo de Leteo* kaj poste aliaj poemoj, precipe *Miaj Penatoj*. Verkante ĉe la limo inter (nov)klasikismo kaj sentimentalismo, eksperimentante lingve kaj stile, li okupis tute apartan lokon en la antaŭpuŝkina rusa literaturo. Post la fino de la milito li komencis verki pli profunde, pli psikologie, kaj pli triste. En 1817 aperis lia duvoluma kolekto *Provoj versaj kaj prozaj*, en kies dua volumo estis liaj poemoj.

En 1819 Batjuškov kiel diplomato forveturis al Italio, sed post du jaroj la hereda mensmalsano ombris lian vivon. Post sensukcesa kvarjara kuracado en Germanio li pasigis la vivoreston en Vologda. Atingis nin malmultaj liaj poemoj, verkitaj post la *Provoj*, ekzemple, *El la helena antologio* (1818) kaj *Imite al la antikvuloj* (1821), plejparton li neniigis. La ujo frakasigis, sed eĉ la restinta malmulto eternigis lin en la rusa literaturo.

MIA GENIO

Memor' de l' koro! Venkas vi
La triston de raci-memoro,
Per via dolĉa iluzi'
Min ravas en fremdlanda foro.
La kara voĉo — en memor',
Kaj ŝia blua okulparo,
Fluantaj ondoj de l' hararo,
Senzorgaj bukloj kiel or'.
De l' paŝtistino senkompara
Vestaĵoj simplaj en imag',
Neforgesebla bildo kara
Tra l' vivo sekvas min dum vag'.
Gardanto mia, am-donito,
Dum longa diso — la konsol':
Alflugos ĝi dum dorm' al lito,
Dolĉigos sonĝon en tutsol'.

(1815)

VEKIĜO

Zefiro sonĝon ĉe l' vekiĝ'
De l' okulharoj ĵus forblovis,
Sed veki min por la feliĉ'
Flugiloj de Zefir' ne povis.
La dolĉo de matena pur'
Kun antaŭsento de aŭroro,
La kamp-aera bonodoro,
Kaj brilo de ĉiel-lazur',
Kaj fluga kuro de stalono
Laŭ herb-veluro sur eben',
Kaj hunda boj', ĉaskorna sono
Ĉe golf' dezerta je maten' —
Ho ve, gajigas jam nenio
Animon plenan de sopir'

Ne venkos en fier' racio
La amon per malvarma dir'.

(1815)



Pjotr Vjazemskij

Pjotr Andréjevič Vjázemskij (Вяземский, 1792-1878) naskiĝis en Moskvo, en familio de riĉa rusa princo edziniginta irlandaninon. Ricevinte brilan hejman edukon, li daŭrigis siajn studojn en Peterburgo kaj en Moskvo, sed en 1807 post la forpaso de la patro, li reiris al la hejmo, kie lin prizorgis lia bofrato, verkisto kaj historiisto Nikolaj Karamzin, kies hejmon frekventis plej famaj tiuepokaj beletristoj.

En la frua junaĝo Vjazemskij ekverkis, stimulte de la agrabla vivo, frua edziĝo (en 1811) kaj la milito kontraŭ Napoleono. Li verkis epikurecajn poemojn, elegiojn, epigramojn, fablojn. Postmilito sub la influo de la liberalaj ideoj li projektis konstitucion, kio kaŭzis konflikton kun lia diplomata ofico en Varsovio (tie li ankaŭ framasoniĝis). Forlasinte la ŝtatan servon en 1821, li verkis plurajn romantikismajn elegiojn kaj socie engaĝitajn poemojn inkluzive de *La Rusa Dio*. Lian popularecon atestas, ekzemple, tio, ke la unuan ĉapitron de *Eŭgeno Onegin* de lia amiko Puŝkin, komencas epigrafo el *La unua neĝo* de Vjazemskij.

En 1830 Vjazemskij ekservis en la financa ministerio, kaj fine de sia kariero li estis vicministro pri klerigo kaj ĉefcenzuristo en Ruslando, senatano, membro de la Ŝtata Konsilio. En sia matura aĝo Vjazemskij estis konservativulo, tio respeguliĝis en liaj lirikaj (ekzemple, *La Sankta Rusujo*) kaj literaturologiaj verkoj. Demisiinte en 1858, li ekloĝis en Germanio kaj post 20 jaroj mortis en Baden-Baden.

AL LA PORTETO DE BOMBASTA POETO

Bibris' per lingvo dia kantis, sen diskut':
Neniu el homar' komprenus lin en tut'.

(1810)

EPITAFO

Rusia Diogen' jen kuŝas ĉi-parcele:
Tiu ja vivis en barel', la nia — kunbarele.

(1811)

DU HUNDOJ

"En ĉambro dormas vi, mi frostas sur peron',
Pro kio?" — grasan mopson skoldis hundo vila.
Respondis tiu: "pleje simplas la rezon':
Prenitas vi por serv', mi — por amuz' facila".

(1819)

BATITA HUNDO

Hund' bojis al ŝtelist', punitas ĝi pro ĝeno
al dormo de sinjoro; je alia foj'
Dormadis hund', kaj priŝtelitas domo: je mateno
Punita estis hundo — ĉar ne estis boj'.

(1819)

HOMO KAJ PAPILIO

Mokadis hom' pri eta papili'.
"Matena gast'! Vi povras, senkonsola! —
Momentas via vivo! — diras li. —
Kaj via tombo jen — arbust' viola".

Viciĝas multaj jaroj laŭ rutin'
Cent jarojn havas la oldul' en fin'.
Mortante jam sur lito de turmento,
Li diris kun suspir': "La viv' estas momento!"

(1819)

* * *

Aspekton de Femido kial, artemuloj,
Kun glavo kaj pesil' imagas vi en glor'?
Per glavo ŝi senkulpajn buĉas sen skrupuloj,
Kaj per pesil' ekscias pri korupt-valor'.

(181?)

LANGO KAJ DENTOJ **(orienta apologo)**

Sultan' veziron skoldis foje pro la mank',
Ke li ne estis firma laŭ la karaktero.
"Pro tiu manko — al la sorto estu dank'!
Ĝi min retenis en la gloro kaj prospero, —
Respondis la veziro, — tiu ĉi malfirm'
Dum la kortegaj ŝanĝoj estis mia ŝirm'.
Mi sesdekjaras nun, — aldonis li, frivola, —
El firmaj dentoj, kiujn al mi donis la natur',
Ne multaj — vidu — restis nur;
Transvivis ilin ĉiujn mia lango mola."

(1823)



Jevgenij Baratynskij

Jevgénij Abrámoviĉ Baratýnskij (Баратынский, 1800-1844) naskiĝis en pol-devena nobela familio en Tambova gubernio. En 1812 li eklernis en la Peterburga suboficira lernejo, sed en 1816 li estis eksigita pro ŝtelo, kaj al li estis malpermesita ŝtata servo. Nur en 1819 Baratynskij denove armeaniĝis kiel simpla soldato en Peterburgo, kaj en 1820 kiel suboficiro li estis sendita por kvin jaroj al Finnlando. Oficiriĝinte en 1825, li sekvajare edziĝis kaj forlasis la armeon. Aŭtune 1843 Baratynskij forveturis al Francio, kaj poste al Italio. En Napolo li malsaniĝis kaj mortis.

Baratynskij verkis precipe elegiojn. Ili estis unuafoje presitaj en 1819. Li novisme enmetis en siajn elegiojn psikologion kaj filozofion. Puŝkin taksis lian *Konfeson* (1823) kiel la plej bonan rusan elegion kaj ŝatis ankaŭ lian finnan poemon *Eda* (1824). Grandan popularacon havis ankaŭ *Festenoj* (1820), *Balo* (1828, ĝi aperis en *Du versrakontoj* kune kun *Grafo Nulin* de Puŝkin) kaj *Ciganino* (1831). En la 1830aj jaroj la verkoj de Baratynskij iĝis pli mornaj kaj senesperaj. En 1827 kaj en 1835 aperis liaj poemaroj ambaŭ sub la modesta titolo *Versoj*, kaj en 1842 estis eldonita lia tria poemaro *Krepuskoj*.

* * *

Disiĝis ni; la ĉarmo kaj admiro
Nur efemeris en la vivo-bol';
Por mi neniam sonos am-parol',
Kaj ne varmigos min la ama spiro!
Mi ĉion havis, perdis en moment';
Ekdormis mi... tuj sonĝo amoplena
Degelis! Sole nun amaro ĝena
Al mi postrestis de feliĉa sent'.

(1820)

* * *

Komence penso trovas sin
En densaj vortoj de poemo —
Malklara, kiel virgulin'
Por la monduma neglektemo;
Kaj poste, pli kuraĝa jam,
Edifas ŝi kun preciozo,
En bril' de ĉiaspeca fam' —
Edzino, sperta pri la am',
En romanista flua prozo;
Plu, babilema oldulin',
Venanta kun aroga ŝriko,
Ŝi en gazeta polemiko
Banalon semas laŭ rutin'.

(1837)

* * *

Konstante en purpur' kaj oro,
En belo de pasi-torent',
Vi ne suspiras kun doloro
Pri perdo de juneca sent'.

Ol jun-gracioj vi pli ĉarmas!
Pli pompas sunsubir', ol tag'!
Pli korpas vi, pli arde varmas
Ol vivaj, brila ombr-imag'!

(1840)

PLENDO

Plago de bela somero, muŝo veinda, vi kial
Flirtas, por mia sufer', jen ĉe l' vizaĝ', jen ĉe l' man'?
Kiu pikilon provizis, kapablan ĉesigi arbitre
Penson en fluga liber', kison de arda amor'?
Vi el pacema revanto, el fil' de eŭropa droloto
Faras la sciton sovaĝan, streban al mort' de rival'.

(1841)



Nikolaj Jazykov

Nikoláj Miĥájloviĉ Jazykov (Языков, 1803-1846) naskiĝis en riĉa nobela familio en la urbo Simbirsĉk (nun Uljanovsk) ĉe Volgo. Studante minindustrion kaj fervojon en Peterburgo kaj filozofion en Derpt (nun Tartu), li ne fervoris pri scienco, sed preferis diboĉan vivon kaj poezion, famiĝinte kiel “poet’ de ĝojo kaj ebrio”. En la plejparte germanlingva studenta ĉirkaŭaĵo en Derpt li fondis rusan literaturan rondeton kaj verkis patriotajn elegiojn kaj kantojn. Ekde 1819 liaj poemoj aperis en gazetaro.

En 1829 Jazykov ekloĝis en Moskvo, poste en sia vilaĝo Jazykovo proksime de Simbirsĉk. Fide de la 1820aj kaj komence de la 1830aj jaroj li verkis *Naviganton* kaj aliajn popularajn poemojn, el kiuj kelkaj iĝis kantoj aŭ romanoj. En 1833 li grave malsaniĝis (misfunkcio de la spina medolo). En 1837 li forveturis kuracocelo en Germanion kaj Italion. En 1843 li revenis al Moskvo kaj proksimiĝis al la “slavofilaj” rondoj. Pro la poemo *Al ne-niaj* (verkita en 1844, sed oficiale publikigita nur en 1871) li estis draŝita de Belinskij, Herzen, Nekrasov kaj aliaj adeptoj de la “okcidentema alo” kiel reakciulo. Kelkaj liaj lastaj poemoj (*Tertremado*, *Ŝtormo*, *Naĝado en maro* k. a.) estas inter la plej belaj lirikaĵoj verkitaj en la rusa lingvo.

MUZO

Diin' de kordoj vivas pli,
Ol dioj de tondrad' kaj ŝtalo,
Ne donis al katenoj belajn manojn ŝi
En la epok' de malmoralo.
Plu ĉie regas morto kaj milit',
Senbrida fort' en moŝta krono;
Kaj ĝi detruis sen hezit'
Altaron de belec' kaj bono;
Sed el ruinoj kaj dezert',
El silentado de malvivo,
Leviĝis kun majesta cert'
Anĝel' senmorta de kreivo.

(1824)

PREĜO

Mi petas sanktan providencon:
Kun premaj tagoj lasu min,
Sed donu feran paciencon,
Ŝtonigu l' koron en la sin'.
Senŝanĝa venu mi al pordo
De mia nova viv-real',
Samkiel venas al la bordo
La Volga ondo sen disfal'!

(1825)

ELEGIO

Silentas tondro de popolo,
Kaj katenitas rusa saĝ',
Kaj subpremita libervolo
Impeton kaŝas de kuraĝ'.

Ho! Longe ĉenoj de sufero
Ne falos de patruja sin',
Jarcentoj pasos en rutin' –
Kaj ne vekigōs Rusa tero!

(1824)

* * *

Ve! Konvinkigis mi decide kaj tutcerte,
Ke ne por mi vi ĉarmas kaj belegas tre:
Por mia korpo ja tro grandas vi, laŭsperte,
Sed por animo mia etas vi, ho ve.

(1825)

ROMANCO

“Sinjoro, ĉu vidas vi arbojn en for’?
Sub ili ĉifitas la herbo, sinjor’!”
– Sed kiu tretumis sur juna herbar’?
Ho, kiu kanajlo, aroga sen bar’?
“Hieraŭ alvenis post la tago-fin’
al ĝi ĉevalisto kaj juna fraŭlin’.
Tutnokte kuŝadis, en plena malhel’;
Fraŭlin’, onidire – filin’ de nobel’.
Sur ŝi gaza robo blankadis en klar’,
Du rozoj skarlataj en nigra buklar’;
Juvel’ diamanta, zon’ – blua kolor’,
Kaj ĉeno el oro, kaj kruco el or’.
Mi vidis: eniris ŝi domon sen tim’,
.....”
Sinjoro paliĝis pro kora sufer’:
Rekonis li tuj fianĉinon, en ver’.

(182?)



Aleksandr Puŝkin

En ĉi tiu antologieto ni kelkfrazo skizas la vivon kaj kreadon de ĉiu poeto, sed estas superflue prezenti en simila maniero la plej grandan rusan poeton Aleksándr Sergéjeviĉ Púŝkin (Пушкин, 1799-1837), kiu estas bone konata ne nur en Ruslingvujo, sed ankaŭ en Esperantujo, ja la unua beletra libro Esperanta estis lia novelo *Neĝa blovado*, tradukita de Grabowski, kaj poste en nia lingvo aperis multaj Puŝkinaj verkoj.

“Puŝkin estas nia ĉio”, – skribis la rusa poeto kaj kritikisto Apollon Grigorjev en 1859, sed ĉar ĉi tiu esprimo estas tro ĝenerala kaj patosa, ni aldonas iom pli vastan takson de la plej konata rusa literatura kritikisto Vissarion Belinskij en la krestomatia eseo *La verkaro de Aleksandr Puŝkin*, verkita naŭ jarojn post la pereado de Puŝkin en duelo:

“Puŝkin estis plejparte poeto, artisto, kaj laŭ sia naturo li ne povus esti io alia. Li donis al ni poezion kiel arton, kiel kreaĵon. Kaj pro tio li ĉiam restos granda, modela majstro de poezio kaj instruanto de arto. Al la specialaj ecoj de lia poezio apartenas la kapablo evoluigi en la homoj la senton de l’ belo kaj la senton de l’ homamo, taksante ĉi tiun vorton kiel senliman estimon al la digno de l’ homo kiel homo. Malgraŭ siaj genealogiaj antaŭjuĝoj, laŭ sia naturo li estis persono amanta, simpatia, preta tutkore etendi sian manon al ĉiu, kiu ŝajnis al li “homo”. Malgraŭ lia ardo, kiu povis esti ekstrema, ĉe l’ karaktero forta kaj potenca, en li estis multe da infaneca humilo, moleco kaj tenero. Kaj ĉio ĉi respeguliĝis en liaj fajnaj kreaĵoj. Venos la tempo, kiam en Ruslando li estos klasika poeto, laŭ kies verkoj oni kreas kaj evoluigos ne nur la estetikan, sed ankaŭ la moralan senton”. (1846)

AL ĈAADAJEV

Pri am', esper', kvieta gloro
Trompita estis naivul';
Degelis juna rev' en foro,
Samkiel sonĝo aŭ nebul';
Sed brulas plu en ni pasio:
Sub jugo de fatal-potenc'
Ni per anim' sen pacienc'
Aŭskultas vokon de Patrio.
Atendas kun sopira ĝuo
Ni sanktan tempon de liber',
Samkiel pensas kun esper'
Junul-amant' pri rendezuo.
Dum per libero ardas ni,
Dum koroj vivas por honoro,
Amik', dediĉu al Patri'
Impetojn noblajn de la koro!
Ascendos — kredu, kamarad'! —
La stelo de feliĉo rava,
Rusi' vekiĝos el dormad',
Kaj niajn nomojn filo brava
Alskribos sur ruin' de krad'!

(1818)

MALLIBERULO

Mi sidas post krad' en malseka karcer'.
Aglido, kreskinta en la malliber',
Malgaja amik', kun flugila svingad',
Sangantan nutraĵon disbekas ĉe l' krad'.

Li bekas, kaj ĵetas, rigarde al ĉel',
Kun mi kvazaŭ samon havante por cel';
Li vokas min per la rigardo kaj kri'
Kaj, ŝajne, parolas: "Forflugu do ni!

Ni, birdoj liberaj, ekflugu sen dub'
Al for', kie monto blankadas post nub',
Al for', kie bluas la mara lini',
Al for', kie vagas nur vento... kaj mi!.."

(1822)

AL LA VARTISTINO

Ho amikin' de temp' amara,
Kaduka mia kolombin',
En solo, en densej' arbara
Delonge vi atendas min.
Vi sub fenestro de kabano
Angoras, kvazaŭ en deĵor',
Kaj en sulkoza via mano
Trikiloj lantas dum labor'.
Tra l' forgesita pord' rigardas
Vi al lontana nigra voj';
En via brusto preme ardas
Sopiro, zorgoj kaj malĝoj'.
Al vi jen ŝajnas...

(1826)

* * *

Kartvelajn montojn kovras noktkurten';
Aragvo antaŭ mi bruegas.
Malpezas mia sent'; mi tristas en seren',
En mia tristo vi plu regas,
Nur sole vi... malĝojon mian kun amar'
Nenio ĝenas, ne formovas;
La koro brulas plu, kaj amas — simple ĉar
Ne ami tute ĝi ne povas.

(1829)

* * *

Mi amis vin. Kaj mia am', envere,
Ne tute estingiĝis en anim';
Sed ĝi ne plu vin tuŝu eĉ pretere;
Ne volas mi ĉagreni iel vin.
Mi amis vin senvorte, senespere,
Premata de ĵaluzo kaj fascin';
Mi amis plej sincere kaj tenere —
Ke nun alia same amu vin.

(1829)

* * *

Ermitoj piaj, kaj la inoj ĉaste helaj,
Por levi kore sin al sferoj transĉielaj,
Kaj por firmigi l' koron en batal', enŝtorme,
Kunmetis preĝojn di-adorajn plej multforme;
Sed el ĉi tiuj preĝoj sole min inspiras
Nur tiu, kiun sacerdot' ripete diras
En tagoj de malĝojo dum Karesma Fast';
Al mia buŝo venas ĝi plej ofte, sen prokrast',
Subtenas la falinton per la fort' mistera:
Sinjoro mia! Pekon de senag' sufera,
Potenc-avidon, ĉi kaŝitan mord-serponton,
Al mi ne donu, ankaŭ vantan elokventon.
Vidigu, Disinjur', de miaj pekoj multon,
Ke mia frat' de mi ne havu la insulton;
Spiriton de toler', humilo, am-ador'
Kaj de ĉasteco — revivigu en la kor'.

(1836)



Miĥail Lermontov

Miĥail Júrjeviĉ Lérmontov (Лермонтов, 1814-1841) naskiĝis en nobela familio de eksoficio (laŭlegende, el skota deveno) kaj filino de riĉa aristokratino el la fama familio Stolyпин, sed post la frua morto de la patrino lin edukis lia despotema avino. Post dujara studado en la Moskva Universitato (1830-32) li estis devigita forlasi ĝin kaj aliĝis al la suboficira lernejo en Peterburgo, post kies fino (1834) li servis en gvardia husara regimento.

Pro sia poemo okaze de la morto de Puŝkin (1837), li estis forsendita al provinca regimento, post unu jaro revenis en Peterburgon, oficiriĝis, sed en 1840 pro duelo kontraŭ filo de la ambasadoro de Francio estis sendita al Kaŭkazo, kie la 15an (27an) de julio 1841 Nikolaj Martynov mortigis lin en duelo ĉe la monto Maŝuk.

Dum la mallonga vivo de Lermontov aperis nur du liaj libroformaj verkoj: poemaro kaj romano *Heroo de nia epoko*, ambaŭ en 1840, sed lia verkaro forte influis la rusajn literaturon kaj socian vivon. Liaj verkoj vivas en teatro, muziko kaj kino, kaj verŝajne estas neniuj rusoj, kiu ne povus deklami almenaŭ la unuajn versojn de liaj poemoj *Velo*, *Morto de l' poeto*, *Borodino*, *Mi eliras sola sur la vojon*, *Klifo*, *Mcyri*.

Ni menciuj, ke fine de la 1980aj jaroj, post kolekto de antaŭmendoj en la tuta Sovetunio, oni eldonis lian duvoluman verkaron (1424 paĝoj) en la enorma eldonkvanto 14.000.000 ekzempleroj, pli granda ol la eldonkvantoj de similaj kolektoj de Puŝkin, Jesenin kaj Majakovskij.

AL STULTA BELULINO

Amor' demandis min iame,
Ĉu min allogas lia vin' –
Mi tiam ne soifis ame,
Sed trinkis ĉiom, ĝis la fin'.

Nun vane mi estingi penas
Soifon de brulanta buŝ' –
Pokalo de l' pasi' malplenas,
Samkiel via kapo-fuŝ'.

(1830)

STANCOJ

Per menso atentinte re
La ĉenon, kiu l' vivon ligis, –
Mi ne sopiras pri l' pase':
Ĝi min neniom kontentigis.

Al ĝi, samkiel al nun-est',
Verŝiĝis de pasioj ŝpruco,
Surŝutis ĝin malic-tempest'
Samkiel neĝ' sur stepa kruco.

Respondon al la sento-flam'
Ne trovis la soif' anima,
Kaj se mi kantas pri la am' –
Ŝi estis mia rev' intima.

Al mi, samkiel meteor',
Brilinte en mallum' vespera,
Ŝi estis ĉio por la kor',
Kaj trompis, kiel ĉio tera.

(1831)

KIAL

Mi tristas, ĉar mi amas vin, kaj scias nun,
Ke misas sorto por floranta via jun' –
Ja ne indulgos ĝin monduma klaĉ' turmenta.
Pro ĉiu hela tag', aŭ pro dolĉec' momenta
Per larmoj kaj sopir' vi pagos al destin'.
Mi tristas... ĉar gajeco ne forlasas vin.

(1840)

ENUO KAJ TRISTO

Enuo kaj tristo, sen mano amika. Sopir'
En hor' de anima malhelo...
Deziroj!.. Ĉu indas eterna kaj vana dezir'?.
Kaj jaroj forpasas – plej bonaj, sen celo!

Ĉu ami... Sed kiun? Portempe – sensencas la pen',
Kaj ami eterne ne eblas.
Rigardi en sin? Ĉio pasis, kaj regas malplen':
Kaj ĝoj', kaj turmentoj, kaj ĉio tro feblas...

Pasioj? Sed frue aŭ tarde la dolĉa dolor'
Degelos pro vort' de racio;
Kaj viv', esplorita kun frida atenta rigor' –
Ja estas nur ŝerco sen sprit', plu nenio...

(1840)



Fjodor Tjutĉev

Fjódor Ivánoviĉ Tjutĉev (Тютчев, 1803-1873) naskiĝis en 1803 en riĉa nobela familio proksime de Brjansk en Orjola gubernio. Farinte en la hejmo la gimnazian kurson sub la gvido de Semjon Raiĉ (Amfiteatrov), li dum du jaroj kompletigis la studojn en la Moskva Universitato, kaj jam en la 18-jara aĝo ekoficis kiel diplomato en Munkeno, kie li pasigis pli ol dudek jarojn.

Reveninte en Ruslandon en 1844, Tjutĉev ekoficis en la ministerio pri eksteraj aferoj. En 1858 li iĝis prezidanto de la Poreksterlanda cenzura komitato kaj restis en tiu posteno ĝis sia morto (1873) en la alta ŝtatoficista rango “sekreta konsilisto”.

Tjutĉev tre frue ekverkis poezie. Oni konas poemon, kiun li verkis kiel sep-jara infano. Kiam li estis 14-jara, li estis akceptita kiel membro de la societo de ŝatantoj de la rusa literaturo, sed post la fino de la universitato li malofte verkis, kvankam liaj tiutempaj *Printempa fulmotondro* (1828), *Printempaj akvoj* (1830) kaj *Silentium!* (1830) estas nun en la “trezorujo” de la rusa poezio. En Bavario li tradukis verkojn de Ŝilero, Goeto kaj Heine.

Lia debuta poemaro aperis nur en 1854, kaj en ĝi jam estis liaj poemoj inspiritaj de la amrilato kun la juna Jelena Denisjeva (La ciklo de Denisjeva), kies morto en 1864 kaŭzis fortan krizon ankaŭ en liaj verkoj. Liaj poemoj, verkitaj en la lasta vivoperiodo estis precipe meditigaj: pri la vivo, pri la aĝo, pri la naturo, kaj pri Ruslando, inkluzive de la oftege citata “Rusland’ racie ne koneblas...” (1866).

AL N. N.

Vi amas! Vi afektas tre volonte:
Se en tumulto, ekster hom-atent',
Per gambo mi vin tuŝas por moment',
Respondas vi — kaj ne ruĝiĝas honte!

Aspekto samas — distra kaj sensenta,
Ridet', okuloj, movoj — sama bel'...
Sed via edzo, fia sentinel',
Admiras vian ĉarmon, memkontenta!..

Vi dank'al homoj kaj laŭ la destin'
Valoron de kaŝitaj ĝojoj multaj
Ekkonis... Estas, laŭ mondom', adultaj
La ĝojoj... Sed adulto flatas vin.

Kaj la hontema ruĝo senrevena
De viaj freŝaj vangoj flugis for —
Jen fuĝas la radio de Aŭror'
De junaj rozoj kun anim' serena.

Do estu tiel. Dum somera ard'
Aspekto de vinbero: sang-karmino
En densa ombr', en verdfolia sino
Por sentoj plaĉas, logas por rigard'.

(1829)

PROBLÉME

De mont' ruliĝe, venis ŝton' al valo
Neniu scias kaŭzon de la falo —
Ĉu mem la ŝtono falis de sur pint',
Aŭ estis fremda vol' de faligint'?
Jarcento flugis post jarcent' pretere:
Neniu solvis la demandon vere.

(1833)

* * *

Sur la ĉielo helas fuma stri'! —
Kaj sube ombro glitas en mallumo!..
"Jen nia vivo, — diris vi al mi, —
Ne hela fum' en bril' de lun-radi',
Sed ombro, kiu fuĝas for de l' fumo..."

(1848 aŭ 1849)

* * *

Senpovas ni je antaŭsci'
Pri la rezult' de nia vorto, —
Al ni kunsenton donas sorto,
Samkiel benon havas ni...

(1869)



Nikolaj Nekrasov

Nikoláj Alekséjevič Nekrásov (1821-1878) naskiĝis en la urbo Nemirov (Podoljska gubernio, nun en Ukrainio), kie pasigis sian armean servon lia patro, edziniginta poldevenan filinon de riĉa farmisto. En 1824 la patro eksarmeaniĝis kaj ekloĝis en sia familia vilaĝo en Jaroslavlja gubernio. En 1838 la patro sendis la filon al Peterburgo por studi en la oficira lernejo (Dvorjanskij polk, poste Artileria lernejo), sed tiu aliĝis al la Peterburga universitato kiel “libera aŭskultanto”, vivtenante sin per privataj lecionoj kaj verkado de artikoloj. Forlasinte la universitaton, li eklaboris en la redakcio de *La Patrolandaj Notoj*. Li kompilis kaj eldonis kelkajn almanakojn, inter kiuj la plej sukcesa estis *Fiziologio de Peterburgo* (kun *Malriĉaj homoj* de Dostojevskij). Lia unua poemaro *Revoj kaj sonoj* aperis en 1840.

Nekrasov nun estas nomata la plej granda rusa popola poeto. Efektive, en siaj poemoj, precipe en la 5000-versa poemego *Kiu bone vivas en Rusujo* (1863-1877) li ne nur prezentis vastan panoramon de la kamparana Ruslando, sed li faris tion per lingvo tre proksima al la popola, tamen ne primitiva, sed esprimriĉa kaj belsona. Liaj poemoj *Patrujo* (1846), *Poeto kaj civitano* (1855), *Saŝa* (1856), *Meditado ĉe la ĉefa enirejo* (1858), *Kolportistoj* (1861), *Rusaj virinoj* (1872), *Al semantoj* (1876) kaj aliaj estis popularaj en tiutempa opozicia “demokratia” movado.

Multaj versoj el la popolecaj kaj civitanaj poemoj de Nekrasov estas eĉ nun ŝatataj kaj citataj, ankaŭ kantataj; kaj en ilia ombro restas lia liriko (ekzemple, la ciklo dediĉita al Avdotja Panajeva), elegioj, satiroj, publicista verkaro, kaj lia redaktado de la revuoj *Samtempulo* kaj *La Patrolandaj Notoj*.

VANJKA*

Ridinda sceno! Stulta fiakrist',
Por plaĉi al la pasaĝer' bonstata,
Purigas jungo-ŝildojn kun persist'
Sur ĉevalaĉo magra, turmentata.
Ĉu same vi, ho aĉetebila bel',
Al falsa bril' strebante, inter haroj
Kirlumas diligente, laŭ model',
Sur kapo, duonkalva jam de jaroj?
Sed ambaŭ vi – stultulo la koĉer',
Kaj vi, kombita plej ridinde damo, –
Ne ridon vekas enanime – sed, en ver',
Por mi videblas ĉie dramo.

(1850)

* Vanjka (Ivaĉjo) estas kutima tiutempa voknomo por fiakristoj de plej malalta klaso.

* * *

Ne scias mi eston de homoj ceteraj, –
Por mi pleje karas la bonoj surteraj.
Mi amas la teron, la sunon laŭ vol',
Deziras, esperas, pasias ĝis bol'.
Avidas l' orel', scivolemas okulo,
Kaj mi en deziroj malsatas, ardulo.
Do kial mi ĉiam sopiras en ploro,
Por vana malĝoj' disipiĝas la koro?
Mi kial ne iras laŭ larĝa vojeg'
Por bonoj de l' vivo, en bunta homgreg'?

(1855 aŭ 1856)

ELEGIO

Kaprica modo al ni diras kun leĝero,
Ke tro malnovas temo – “de popol’ sufero”,
Kaj ke forgesi tion devas poezi’.
Ne kredu, junaj! Ja ne malnoviĝas ĝi.
Se jaroj povus ĝin oldigi laŭ bonvolo!
Prosperus dia mond’!.. Sed ve, dum la popolo
Treniĝas en mizer’, al vip’ obee nur,
Samkiel magraj brutoj sur falĉita rur’,
Priploros Muzo l’ sorton, servos al libero,
Ne eblas unuiĝ’ pli firma sur la tero!..
Dum festas hom-amaso kun jubil’ kaj kant’,
Rememorigo pri popolo-suferant’,
De l’ potenculoj al popol’ atent-altiro –
Ĉu eblas ja destin’ pli inda por la liro?..

Dediĉis liron mi al la popola bon’.
Kaj eĉ se mortos mi lasita, sen rekon’,
Mi servis ĝin – do sentas kor’ trankvil-efikon...
Ne ĉiu militant’ damaĝas malamikon,
Sed – iru al batal’! Kaj sort’ decidus tuj...
Mi vidis tagon: ne plu sklavo en Rusuj’!
Mi verŝis dolĉajn larmojn en raviĝo kora...
“Sufiĉas jubiladi en naiv’ adora, –
Alflustris Muzo min. – Pluiru, jen kondiĉ’:
Liberas la popol’, sed kio pri feliĉ’?..

Ĉu aŭdas kantojn mi dum rikoltado greni,
Aŭ vidas maljunulon en plugado pena,
Ĉu gaja knabo kun ludemo kaj fajfad’
Al patro portas manĝon laŭ herbeja pad’,
Ĉu brilas kaj sonoras falĉilar’ rapida –
Mi serĉas la respondon al demand’ insida,
Bolanta en la mens’: “Ĉu dum pasinta jar’
Pli tolereblas jam laboro sur kampar’?
Kaj pro libero nuna, post sklavec’ jarcenta,
Ĉu fine venis ŝanĝo klara, evidenta

Al sorto de popol'? Al kantoj en vilaĝ'?
Aŭ sonas tie plu malĝojo kaj domaĝ'?.."

Vespero venas jam. De l' revoj obsedite,
Tra kampoj kaj herbejoj vagas mi medite,
Preteras fojnostakojn en krepuska dens',
Kaj kanto per si mem formiĝas en la mens',
Esprim' de meditado ĵusa en sekreto:
Por kamp-labor' mi vokas benon en kvieto,
Por malamik' – insulton sendas en krUEL',
Kaj por amik' – plenpovon petas de l' ĉiel',
Kaj laŭtas mia kant'!.. Tra kampoj ĝi resonas,
Kaj eĥo de montaro la ripetojn donas,
Replikis la arbar'... Naturo – en atent',
Sed mia prikantato en vesper-silent',
Al kiu la poetaj revoj apartenas,
Ne aŭdas min, ho ve! – kaj la respond' ne venas...

(1874)



Aleksej K. Tolstoj

Aleksėj Konstantínovič Tolstój (1817-1875), filo de grafo Konstantin Tolstoj (kaj duagrada kuzo de Lev Tolstoj) kaj Anna Perovskaja, post frua disiĝo de la gepatroj estis edukata de sia onklo Aleksej Perovskij (kiu verkadis kiel Anton Pogoreljskij), frue mergiĝis en la mondumon, infanaĝe amikiĝis kun la estonta imperiestro Aleksandro II, en la 18-jara aĝo eltenis universitatan ekzamenon kiel diplomato, okupis gravajn ŝtatajn postenojn en diversaj sferoj, kaj ekŝiĝis el la ŝtata servado en 1861.

Aleksej K. Tolstoj ekverkis frue, unue versaĵojn, gotikajn kaj fantastajn novelojn, sed famigis lin verkoj historiaj: romano *Princo Serebrjanyj* (1861; ĝia Esperanto-traduko de Ŝidlovskaja (1912) estas kelkfoje reeldonita), drama trilogio *Morto de Ivano la Timinda* (1866), *Caro Teodoro Ioannovič* (1868), *Caro Boriso* (1870), kaj la amuza historia poemo *Historio de la Rusia Regno ekde Gostomysl ĝis Timaŝev* (1868, ĝia Esperanta traduko de Grigorij Arosev aperis en *La Ondo de Esperanto*, 2013, №1).

Li verkis ankaŭ baladojn, russtilajn “bylinojn”, kaj lirikajn poemojn, el kiuj pluraj iĝis romanoj muzikigitaj de Musorgskij, Ĉajkovskij, Rimskij-Korsakov, Raĥmaninov k. a. En ombro de lia drama kaj lirika verkaro restas liaj satiroj kaj humuraĵoj. Unu el ili ni proponas sekvapaĝe.

SAGŬ DE L' VIVO

1.

Se vin logas rang' majora,
Do ne servu en senat';
Alikaze – spron' sonora
Estu ekster via ŝat'.

2.

Kontentiĝu per modero,
Bridu tentojn de malŝpar':
Manojn lavu, laŭ prefero,
Sed piedojn – vana far'.

3.

Estu firma en principo,
Cedu en malgrava dir',
Fortojn streĉu en konstipo,
Lasu lakson sen retir'.

4.

Se ŝiriĝis pantalone
Aŭ malpuras ĝi pro ber' –
Ne demetu en salono,
Sed foriru al kamer'.

5.

Se kvieton ĉambran iu
Rompos per nevola son',
Ne eksaltu kaj ne krii:
"Multajn jarojn! Dia don'!"

6.

Ne mallaŭdu fremdan supon,
Dignu ĉe festena tabl',
De najbar' ne tiru stupon
El orelo, sen afabl'.

7.

De la najbarin' ravito,
Vi ne palpu ŝin je mam';
Por viŝad' de frunta ŝvito
Ne uzeblu tuk' de l' dam'.

8.

Se de l' tablo laŭbezone
Por minut' foriros vi,
Do al damoj fanfarone
Ne menciu tion ĉi.

9.

Ne riproĉu, se inteste
Ekmalsanis la najbar',
Sed provizu senmoleste
Lin per Korŝa foliar'.

10.

Studu l' estran parencaron,
Distru ĝin laŭ ties plaĉ',
Tamen la familieron
Ne transformu al mokaĉ':

11.

Bopatrino vi ne petu
Pri viŝtuk' por boto-par',
Kun avino ne ŝercetu,
Ĉu sufiĉas la dentar'.

12.

De onklin' nomtagon konu,
Laŭdu ĉaston de kuzin'
Kaj senkaŭze ne friponu
Subaksele tikli ŝin.

13.

Kun bofilinar' sen ĝeno
Agu, sed laŭ etiket':
Vermojn dum arbar-promeno
Ne enmetu al korset'.

14.

En arbustojn vi ne logu
La filinojn por duvort'
Kaj detiri ne arogu
Ŝtrumpojn de l' nevin' per fort'.

15.

Se vin vidas homoj – penu
Ne kriaĉi: "Fek! Latrin'!"
Kaj de bebo ne forprenu
Mamon de la nutristin'.

16.

Por fraŭlinoj, komplezema,
Pluku fruktojn en ĝarden',
Pugon sen bezon' ekstrema
Ne elmontru jen kaj jen.

17.

Dum somerumad' en ruro
Gvidu ilin al stalej':
Tio sciojn pri naturo
Helpas ampleksigi plej;

18.

Sed, se volas vi mirigi
Ilin per surpriza trov',
Ne aŭdacu finstigi
Al melkado de virbov'.

19.

Same fie estus ŝovi
Fingron al la pugna fask'
Kun pretekst', ke solvon trovi
Indas por enigma task'.

20.

Ĝenerale, ŝercu milde,
Estu digna en kondut',
Memorante pri ĝentil' de
Oficiro, laŭ statut'.

21.

Se ĉe l' estro dignoplena
Mortos ia parencin' –
Vi per anekdot' konvena
Kun suspir' amuzu lin.

22.

Tamen zorgu, estu deca.
Ne rakontu por konfuz',
Ke jen ĉevalin' bonspeco
Ĉe vi same mortis ĵus.

23.

Ankaŭ ne, ke sendomaĝe
Ni ne vivas sur la ter',
Kaj ke agas hom' malsaĝe,
Se bedaŭras pri l' afer'.

24.

Ĉar se ardas senkompate
Via estro en koler',
Vin forsendi piedbate
Povos lia kurier'.

25.

Vi ne ĵetu, amosenta,
Perlojn al la porka greg' –
Post plugisto diligenta
Iras lerta frugileg'.

(1870)



Kozjma Prutkov

En la antaŭaj paĝoj estis prezentita specimeno de la satira poezio de Aleksej K. Tolstoj. Li estas konata ankaŭ kiel ano de la kelkpersona poeta grupo, kiu verkis uzante la plumnomon Kozjmá Petróviĉ Prutkón (Прутков).

Laŭ legendo, kreita de la kunaŭtoroj, Prutkov naskiĝis la 11an de aprilo 1803 en vilaĝo proksima al la malnova norda Ruslanda urbo Soljvyĉegodsk. Post mallonga armea deĵoro en 1823 Prutkov forlasis la armeon kaj eklaboris en la Etalona ĉambro (fako de la Financa ministerio pri mezurado kaj kontrolado de noblaj metaloj) kie li laboris kvardek jarojn kaj iĝis ĝia direktoro en la alta rango de efektiva ŝtata konsilisto. Li mortis la 13an de januaro 1863.

Nun oni preskaŭ forgesis la dramojn kaj komediojn de Prutkov, sed plu legataj estas liaj aforismoj *Fruktoj de meditado*, fabloj kaj poemoj, verkitaj de Aleksej K. Tolstoj kaj de liaj kuzoj Aleksėj (1821-1908), Aleksándr (1826-1896) kaj Vladimir Ĵemĉŭĵnikov (1830-1884).

Ĝis nun oni diskutas, kia tipo estis Kozjma Prutkov: ĉu pompa rimplektanto, ĉu memironia blagulo, ĉu saĝulo sub la masko de banala malspritulo. Respondo mankas, ĉar la kunaŭtoroj mem ne havis unuecan imagon pri Prutkov, kaj ne ĉiam klaras, kiuloke la fikcia aŭtoro verkis parodiojn, imitis famulojn, aŭ kreis originalajn poemojn. Sed klaras, ke aforismoj kaj versoj de Kozjma Prutkov venis en la ĉiutagan rusan lingvon el literaturo same amase, kiel citaĵoj el verkoj de Ivan Krylov kaj Aleksandr Gribojedov.

JUNKRO ŜMIDT

Velke pasas la somero.
Prujn' arĝente helas...
Junkro Ŝmidt el revolvero
Sin mortpafi celas.
Haltu, frenezul'! Ripete
Verdo vivoplenos!
Junkro Ŝmidt! Mi ĵuras vete —
La somero venos!

(1854)

LA PAŜTISTO, LA LAKTO KAJ LA LEGANTO fablo

Jen foje portis ien lakton la paŝtist',
Sed je tioma fora dist',
Ke li reveni jam ne povis.
Leganto! Eble vi lin ie trovis?

(1859)

KATERINO


*Quousque tandem, Catilina,
abutere patientia nostra?*
Cicerono*

«Alta rang', orden' ĉe l' sino,
kaj ne oldas mi laŭ jar'...
Katerino! Katerino!»
«Jen, jam pretas samovar'.»
«Vera bildo, jen fascino!»
«Ĉu sur muro? Kie do?»
«Vi — la bildo, Katerino!»

«Jes, en ord', ne dikas tro.»
«Viro — mi, kaj vi — fraŭlino...»
«Kion sekvos tio ĉi?»
«Karban brulon, Katerino,
En la brusto sentas mi!»
«Te' varmegas — jen rutino.»
«Sed amaras te', en ver'.
Kial — diru, Katerino!»
«Ĉu malmulte da suker'?»
«Kvazaŭ mankas!» «Kun rafino,
Estas tute bona spec'.»
«Ho, amare, Katerino,
Estas vivi sen edzec'!»
«Vidvo, fraŭlo — sed en fino
Tute mankas diferenc'!»
«Vi obstinas, Katerino,
Jam finiĝas pacienc'!»

* Ĝis kiam, Catilina, vi esplorados nian paciencon (lat.).

(18??)



Afanasij Fet

Rakontante pri Afanásij Afanásjevič Fet (Фет, 1820-1892), ne eblas eviti la implikitan historion de liaj nomo kaj deveno. Liaj gepatroj estis germanoj: Johann Foeth kaj Charlotte Becker. En 1820 la graveda 22-jara Charlotte fuĝis el Germanio kun la 45-jara Ruslanda bienisto Afanasij Ŝenŝin kaj ekloĝis en ties bieno en Orjola gubernio, kie naskiĝis Afanasij, registrita kiel filo de Ŝenŝin. En 1822 Charlotte ortodoksaniĝis kaj kiel Jelizaveta Fet edziniĝis kun Ŝenŝin. Sed en 1834 la konsistorio de Orjol decidis, ke, ĉar la knabo naskiĝis antaŭ la geedziĝo, li devas porti la familinomon de sia germana patro, do li iĝis Fet (aŭ Fjot), perdis la Ruslandan ŝtatanecon kaj ne rajtis heredi la nobelecon de Ŝenŝin. Li lernis en la germana pensionato en Werro (nun Võru en Estonio) kaj en 1838 studentigis en la Moskva Universitato.

Kiel 20-jara studento Fet publikigis sian unuan poemaron kaj komencis kunlabori en *La Patrolandaj Notoj*. En 1845 li armeaniĝis kaj servis kiel oficiro ĝis 1858. Pliaj poemaroj aperis en 1850 kaj 1856, kaj la plej bonaj en la unua volumo de lia verkaro (en la dua estis tradukoj) en 1863, kiam li jam aĉetis bienon proksime al sia naskiĝloko.

En 1873 li rericevis sian familian nomon Ŝenŝin kaj la nobelecon, sed plu subskribis siajn verkojn kiel Fet. En 1881 li aĉetis palaceton en Moskvo kaj publikigis kvar volumojn de *Vesperaj fajroj*.

Liaj poemoj elstaras pro la delikata lirikeco kaj muzikeco, bonega kono de la homo, sentoj, naturo, animstato. Precipe famaj estas liaj “senverbaj poemoj” (ekzemple, la du supraj sekvapaĝe). La poeton de l’ belo pro lia “pura arto” ofte kritikis la “progresemuloj”.

* * *

Bildo rav-serena,
plej amata nun:
Blanka vast' ebena,
Ronda plena lun',
Volbo diafana,
Brila neĝo nur,
Kaj de sled' lontana
La soleca kur'.

(1842)

* * *

Ŝtorm' en ĉielo vespera,
Bruo kolera de mar' –
Ŝtormo en maro kaj pensoj,
Multa turmenta pensar' –
Ŝtormo en maro kaj pensoj,
Ĥor' de kreskanta pensar' –
Nigra nubaro fluganta,
Bruo kolera de mar'.

(1842)

* * *

Mia vitej' transfenestre kreskadas plej bele,
Lumon forŝirmas. Kaj jen – de la fenestro duon'
Supre kaŝitas en densaj verdaĵoj, kaj inter folioj
Kvazaŭ intence sub vitr' ekas flaviĝi grapol'.
Kara, sufiĉas, ne tuŝu! Por kio spirit' de l'detruo!
Vi por vinbero-plukad' manon etendos al kort', –
Blankan kaj pufan maneton najbaroj facile rekonos,
Kaj ili diros: ŝi lin kaŝe vizitis en hejm'.

(1847)

* * *


Ĉio bruas en viv' multkolora,
Tamen vanas gajec' de l' medi':
Mi sen vi sopiregas, angora,
Vi rideton forportis de mi.
Kaj malofte, nur kiam vesperas,
Post enuoj kaj penoj de l' tag',
Via bildo por mi reaperas,
Kaj ridetas mi al la imag'.

(1856)

* * *

Per kora sango skribatas al vi ĉi asertoj,
Ja, pro l' disiĝo por ambaŭ doloras la spertoj,
Vanas ja, por malsanul' al libero aspiri,
Al travivaĵoj malnovaj ne eblas reiri,
Kaj ja en ĉio, nutrinta la amon pasian,
Nun pli facilas por ni skoldi unu alian.

(1884)



Jakov Polonskij

Jákov Petróvič Polónskij (Полонский, 1819-1898) naskiĝis en neriĉa nobela familio en la urbo Rjazanj. Post studoj en la Rjazana gimnazio kaj en la jura fakultato de la Moskva Universitato li laboris en ŝtataj oficejoj en Odeso, Tiflis (Tbilisi) kaj Peterburgo. Ekde la 1860a jaro dum 36 jaroj li okupis gravajn postenojn en la Komitato de eksterlanda cenzuro kaj en la Ĉefa Administrejo de Presaferoj (bone konata al esperantistoj) en Peterburgo.

Polonskij ekverkis poemojn en la gimnazia aĝo (sian unuan poemon li montris en 1837 al la estonta imperiestro Aleksandro II), kaj ekde 1840 liaj poemoj aperis en literaturaj gazetoj. Lia unua poemaro estis eldonita en 1844 kaj la dua en 1845, sekvis pliaj libroj poeziaj kaj prozaj ĝis la kvinvoluma *Plena Verkaro* en 1896. Precipe populara kaj ĝis nun legata estis lia amliriko, elstara forme kaj enhave.

Multaj el liaj lirikaĵoj iĝis romanoj, muzikigitaj de Ĉajkovskij, Raĥmaninov, Dargomyĵskij, Tanejev kaj aliaj komponistoj, kaj nur malmultaj nuntempaj rusoj scias, ke *Kanto de ciganino* ("Mia fajro en nebulo...") estas ne popolkanto, sed lia poemo, verkita en 1853.

VESPERO

La flam' de velkanta aŭroro
Disŝutis fajrerojn ĉiele,
Jen maro lumanta scintilas;
Sur vojo laŭ bord' estingiĝas
Tintila sonor' malagorda,
La kanto de gajaj koĉeroj
En densa arbaro perdiĝis,
Jen mev' en nebul' diafana
Ekbrilis kaj tuj malaperis.
Blankŝaŭma tavolo' balanciĝas
Ĉe ŝton' griza, kvazaŭ lulile
Dormanta infan'. Kiel perloj,
La gutoj de roso freŝiga
Ekpendis sur branĉoj kaŝtanaj,
En ĉiu rosero trembrilas
La flam' de velkanta aŭroro.

(1843)

* * *

Aĥ, sur balkon' – tia belo, karulo! rigardu: en for' –
Lag' tie sube lumanta spegulas en lum' de aŭror';
Cigno plej blanka langvoras, naĝante en sia medi',
Kaj ne forfuĝos de ĝi – same vi, ho amato, de mi...
Eĉ se pri via medi' konvinkadas obstine vi min,
Ke estas mondo ĝi, sed ne la ard' kaj de mi juna sin'!

(1845)

* * *

Mia kanto, por flui je larĝa torent',
Ĉielruĝon atendas matene:
Ke ne nokta mallum', sed aŭror'-orient'
Speguliĝu en ĝi ardoplene.

Ĉirpu birdoj liberaj, arbaro-dormul'
Nun vekiĝu, beligu sin pleje,
Kaj ne ĝenu min strigo per sia ulul',
Blinda, sidu ĝi fore, denseje.

(1864)

* * *

Atingis la deksekan jaron
Jam apud mi najbarinet';
Ŝi havas bluan okulparon,
Tre strikta tenas ŝin korset'.
"Bonjour!" – al ŝi mi diris foje,
Salutis kun respekta klin'.
De tiam, je renkonto nepre
Papava ruĝo kovras ŝin.
Kun mi paroli ŝi evitas,
Samkiel panjo – tima stat'...
Ho Dio! kial ŝi hezitas?
Ne mus' ŝi estas, mi – ne kat'...
Ve, kaŭzon tute mi ne trovas...

Sinjoroj, sed en ver' –
Tremolo, eĉ se vent' ne blovas –
Per ĉiu tremas folier'.

(18??)



Aleksej Pleščëjev

Aleksėj Nikolájevič Pleščëjev (Плещеев, 1825-1893) naskiĝis en neriĉa, sed glor-historia nobela familio en Kostroma. Li ekstudis en la Peterburga sub-oficira lernejo, poste en la Peterburga universitato, sed ne finis la studojn kaj en 1845 dediĉis sin al literaturo. Tiutempe li aliĝis al la socialisma rondeto de Miĥail Petraŝevskij. Same kiel multaj rondetanoj (ankaŭ Dostojevskij, kiu dediĉis al Pleščëjev sian romanon *Blankaj noktoj*), en 1849 li estis arestita kaj mortkondamnita, kaj antaŭ la ekzekuto ricevis pli mildan punon – servadon en armeo. En 1856 li oficiriĝis, eksarmeaniĝis, edziĝis, renobeliĝis, poste ekloĝis en Moskvo kaj Peterburgo. Li laboris en redakcioj de tiutempaj literaturaj gazetoj ĝis 1890, kiam, ricevinte grandan testamenton, li ekloĝis en luksa apartamento de la Pariza hotelo *Mirabeau*.

En 1846 aperis lia unua poemaro kun la poemo *Antaŭen!*, kiu famigis lin kiel revolucionan poeton, kaj en la ombro de tiu renomo restis liaj postaj poemoj lirikaj, porinfanaj verkoj, noveloj, dramoj kaj multaj tradukoj el la franca kaj germana. Sed dekoj da liaj poemoj disvastiĝis tra la tuta Ruslando kiel kantoj kaj romancoj, danke al Ĉajkovskij, Musorgskij, Rimskij-Korsakov k. a. Eble lia alvoko “... en forgeso pri kverel’ kaj malkonsent’, / obee al la alta instruad’ de Kristo, / en unu famili’ kuniĝu ĉiu gent’!”, proksima al similaj versoj de Puŝkin kaj al verkoj framasonaj, trovos ŝaton de la esperantista legantaro.

ELEGIO

(laŭ kanto de iu franca poeto)

Jes, mi vin amas, ĉarma kreitaĵ' tenera,
Vi estas pala stel' en nuboj de vesper',
Arom' de rozo, spiro de ventet' leĝera,
Aŭ son' de trista kant', sonanta ĉe river';

Amata kiel songo, dolĉa sinforgeso
Sur mara bordo apud susuranta kan', –
Sen larmoj, sen ĵaluz', sen streboj al eksceso;
Jen mia am' al vi – rev' pri pasinta van'...

Rigardas mi al vi, pasinta emocio
En mian menson venas, forgesita am',
Kaj ĉio longe jam per dub' mokita, ĉio
De duboj forpuŝita, ne revenos jam.

Senzorga ĝu' por mi ne estas la destino:
Jen kuŝas antaŭ mi longega morna voj';
Kaj hastas mi admiri vin, ho infanino,
Almenaŭ por moment' ripozi de malĝoj'.

(1846)

POST LEGADO DE ĴURNALOJ

Deprime legas mi la sangoplenajn paĝojn,
Kun vortoj pri konfliktoj gentaj, pri minac' –
Samkiel vidas mi deprime la vizaĝojn
En familio, kie regas plu malpac'.

Profunde amas mi Patrujon kaj tutkore
Deziras mi, ke ĝi floradu en prosper',
Sed fremdajn gentojn mi ne traktas malfavore,
En mia kor' ne estas loko por koler'.

Rakonto pri herooj en batal-kruelo
Min per ekstazo brula ne vigligas jam;
Kaj sendas ardajn preĝojn mi al la ĉielo,
Ke al malmolaj koroj nun descendu am'.

Ke pasu tagoj de koler', malĝoj' kaj tristo,
Ke, en forgeso pri kverel' kaj malkonsent',
Obee al la alta instruad' de Kristo,
En unu famili' kuniĝu ĉiu gent'!

(1854)

NASKIĜLANDE

Klinas sin malĝoje
Ĉe ravin' saliko,
Kaj ravino-fundo
Plenas de urtiko.

Orfan tombon flanke
Mi sur kampo vidis:
Sian tristan sorton
Iu mem decidis!

Ŝtipsimile nigras
Fore jen domaĉo;
Ĉu l' povrul' devenis
El tiu vilaĝo?

Tie – laborego,
Premo senespera...
Kaj naturo ĉie
Estas plej mizera!

Kavoj kaj montetoj,
Mutas la kamparo;
Super ĝi flugadas
Krie monedaro...

Ŝiras mian koron
Tiu ĉi imago...
Tristas mi fremdlande,
Ankaŭ hejme – plago.

(1862)

* * *

Savitas jam laŭ via volo
Kor', laca pro batala streĉ'.
Jen via am' – por mi konsolo,
Kaj vortoj – la plej sankta leĝ'!
Azilon mornan vi surtere
Transformis tuj al la eden',
Al viv' min vekis vi, kaj vere
Redonis la kvieton jen.
Nun mi denove sentas ĝojon,
Rigardas rekte kun aŭdac',
En viv' malkovris novan vojon,
Laŭ ĝi rapidas mi sen lac'!

(1879)



Ivan Nikitin

La vivo de Iván Sávvič Nikítin (Никитин, 1824-1861) ne estis eventoriĉa. Li naskiĝis en komercista familio en Voroneĵ. Li ekstudis en porpastra seminario, sed ne finis ĝin, kaj pro la ŝanceliĝo de la familia entrepreno devis rezigni la planon pri universitato kaj eklaboris kiel tenanto de hotelo kun ĉevalejo, en kiu plejparte haltis vojaĝantoj. Tie li aŭdis multajn historiojn, kiujn li poste uzis en siaj verkoj.

Siajn unuajn poemojn Nikitin publikigis en loka gazetaro en 1849, kaj poste aperis du liaj poemoj (1856, 1859) kaj granda poemo *Fikomercisto* (1858), kiujn oni povis aĉeti en la librovendejo kaj legi en la legejo, kiujn li fondis en Voroneĵ. En lia verkaro elstaras poemoj pri naturo kaj pri vivo de simplaj kamparanoj kaj urbanoj. Unuavide senpretendaj, ili tre populariĝis en Ruslando, kaj pluraj el ili – ekzemple, la kanzono pri la brava komercisto veturanta al foiro – nun estas konataj “al ĉiu ruso” kiel popolkantoj en multaj versioj, ofte tre foraj de la originalo.

La 37-jara poeto mortis pro ftizo en Voroneĵ, baldaŭ post la eldono de la romaneto *Ĵurnalo de seminariano* (1861).

KAMPO

La kamp' etendiĝis je onda sateno,
Ĉielen kuniĝis la blua ebena,
Kaj jen ora ŝildo sur la duonsfer' –
La suno brilanta lumegas al ter';
La vento promenas, samkiel tra maro,
Per blanka nebulo vestiĝis montaro,
Kun herboj vent' kaŝe flustretas en val',
Susuras aŭdace tra l' ora sekaĵ'.
Mi solas... Liberas la pensoj en puro...
Jen mia patrin' kaj amiko – naturo.
Kaj ŝajne pli hela la viv' en estont',
Dum al larĝa brusto, al la vivo-font'
Ŝi min, kiel bebon, almetas, retenas –
Kaj parto de ŝia plenfort' al mi venas.

(1849)

AL N. D.

Minutojn de trankvilo ne venenu
Per antaŭsent' de perdoj, de la fin';
Ordonon de l' ĉielo ne divenu:
Neŝanceblas ties leĝ-destin'.

Kaj se jam de lulilo nur kruelon
Al vi proponas sorto laŭ fatal' –
Vi, kiel homo, vian altan celon
Ne forgesadu en turment-batal'.

(1849)

* * *

Amik', ne ploru! Multas tristo
Sen tio jam en mia kor';
Vi kredu, ke multjara disto
Ne iĝos ĉerko por amor':
Pelata en ekzil' dezerta,
Sub prem' de sorta malfavor',
Mi ĉiam pie gardos, certa,
Imagon vian en memor'.

(Inter 1849 kaj 1853)

* * *

Dum Nevo pompa en border' granita
Briladas diamante en malhel'
Kaj gaje sur pavimo lumigita
Preteras min la hom-amas' sen cel' –
Do tiam kontraŭvole mi imagas
Jarcenton eksan: jen sur marĉa ter'
Malriĉa finn' ĉi tie triste vagas –
Id' de malsanoj, zorgoj kaj mizer';
Jarcenton, kiam nur nebul' ĉiama
Arbarojn kaj ĉielon kovris plu,
Kaj estis tiom trista, senornama
La frida belo de libera flu'.
Mi rememoras kun fiero prava
La krea saĝon de majesta car',
Admire pri l' kolosa urbo rava –
De Petro la belega trezorar'.

(1849)

AL LA INFANO


Dezir-angoroj vin ne celas,
Printempas mondo en kviet',
Kaj sen suferoj ĉiam helas
Naiva song' de infanet'.

Senzorga ekster viv-tempesto,
Gajema kiel birdo – jen
En hejmo, en gepatra nesto
Por vi troviĝis la eden'.

Temp' venos – larmon viŝos mano,
Laboro klinos vin al ter'...
Kaj dolĉaj revoj de l' infano
Forvelkos sub rutin-sufer'.

Portante vian krucon deve,
Sub ĝia ŝargô, je plurfoj'
Memoros vi printempon reve,
Sed – ne revenos eksa ĝoj'.

(1851)



Apollon Majkov

Apollón Nikolájevič Majkón (Майков, 1821-1897) naskiĝis en Moskvo, en la nobela familio de la pentristo Nikolaj Majkov kaj la verkistino Jevgenija Majkova (fraŭline: Gusjatnikova). En 1834 la familio ekloĝis en Peterburgo, kie li studis en la jura fakultato de la Peterburga universitato kaj poste eklaboris en la ŝtata fiska departemento. Danke al subvencio de la imperiestro Nikolao I, Majkov pasigis du jarojn eksterlande, studante arton, kaj post la reveno al Ruslando (1844) iĝis ŝtatoficisto; ekde 1852 dum pli ol kvardek jaroj li laboris en la cenzura administrejo, fine kiel la prezidanto de la Poreksterlanda cenzura komitato.

Majkov ekverkis tre frue kaj en la 21-jara aĝo aperigis sian unuan poemaron, kiun sekvis pliaj poemaroj, dramoj kaj tradukoj. Majkov poeziis plejparte pri la naturo kaj historio; en liaj “verkoj de bono kaj belo” sentiĝas influoj helena kaj malnovrusa. Pro sia skeptika rilato al la okcident-eŭropa kulturo li estis forte atakata de la “progresemuloj”. Multaj liaj poemoj danke al muzikigo de Ĉajkovskij kaj Rimskij-Korsakov estas kantataj ĝis nun. Al la rusa kulturo kontribuis ankaŭ liaj fratoj: kritikisto Valerian, prozisto kaj tradukisto Vladimir, literaturhistoriisto kaj bibliografo Leonid.

AL PRIAPO

Faris ĝardenon mi; tie sub fagoj disbranĉaj
En frida ombro starigis Priapan statuon.
Li, kultivanto de pacaj ĝardenoj, gardanto
De ĉiuj boskoj, ĝarden-laboriloj kaj floroj,
Donas al junaj arbetoj la forton por kreski,
Dotas per verdaj folioj, per fruktoj sukplenaj.
Ĉe la statu', el la groto elfalas bruante
Fonto hel-akva, kaj ĝin superŝirmas per branĉoj
Kverkoj, sur tiuj nun turdoj konstruas la nestojn...
Estu indulga, gardanto de l' paca ĝardeno!
Vi, ho kronita per krono, plektita el vitoj,
El flavaj spikoj, hedero! Disverŝu la benon
Vi malavare sur la laborilojn plej simplajn,
Sur la fosilon, kaj serpon rond-arkan, kaj sokon,
Kaj sur la korbojn, per fruktoj plej dense ŝargitajn.

(1840)

PENSO

Similas helan tagon senperturba viv'
Printemp-diluvon – vivo plena de alarmoj.
Jen tie – sunradi' kaj ombro de oliv'
Ĉi tie – fulmoj, tondroj, ankaŭ larmoj.
Ho! brilon de printempo volas mi en tut',
Kaj dolĉon, kaj amaron de la larmogut'!

(1841)

EPIGRAMOJ

Parolu kun popol' sen timo lasi tuton –
korupti korteganojn, sed en pleja grad'
la oficulojn. Car', komencu sen kompat'
Pro ŝtel' sur Ruĝa plac' publikan ekzekuton.

(1853 aŭ 1854)

Da sentaŭguloj famili'
Per riĉ' kaj klin' ceremonia
Regadas super la patri',
Spitante al leĝaro ĉia,
Staradas dense ĉirkaŭ tron' –
Avida mopsa koterio –
Kaj simplanimas en rezon':
"Nur ni ja estas land' Rusio!"

(1855 aŭ 1856)

* * *

Hirundet' alflugis
El trans maro vasta,
Kaj ekkantis gaje:
Februar' koleru,
Marto ĉiel mornu,
Estu neĝ' aŭ pluvo –
Sed printemp' odoras!

(1858)

* * *

Feliĉo?..
Estas vivo-pad',
Laŭ dev' – obstini en irad',
Spit' al kanajl', ĉe l' bar' ne cedi,
Esperi, ami, ankaŭ – kredi.

(1889)



Konstantin Romanov

Kvankam preskaŭ ĉiuj grandaj rusaj poetoj de la 18a kaj 19a jarcentoj estis nobeloj, nur unu el ili apartenis al la reganta dinastio Romanov (Романов) – malantaŭ la poezia plumnomo K. R. sin kaŝis Granda Princo Konstantín Konstantínoviĉ (1858-1915), filo de Granda Princo Konstantin Nikolajeviĉ kaj nepo de Nikolao I. En la junaĝo li servis kiel suboficiro en mararmeo kaj kiel oficiro en gvardio, estis prezidanto de la Ruslanda Akademio de Sciencoj kaj ĉefo de la armeaj altlernejoj. Li laŭeble evitis politikon, ekde la junaĝo li aktoris kaj muzikis, kaj en 1882 en *Heroldo de Eŭropo* aperis lia unua poemo, subskribita K. R.

De K. R. aperis kvar poemaroj, prozaĵoj, dramo *La Reĝo Judea* (Devjatin tradukis ĝin al Esperanto) kaj kelkaj tradukoj, inkluzive de *Hamleto*, kiu longe restis la plej bona inter la rusaj tradukoj. Liajn poemojn karakterizas homamo, lirikeco, meditemo kaj melodieco. Pli ol 50 poemoj de K. R. populariĝis kiel romanoj (i. a. de Ĉajkovskij). Lia poemo pri morto de soldato (*Umer bednjaga v boljnice vojennoj*) iĝis popolkanto kun pluraj tekstaj versioj – tio realigis lian revon akiri la popolan fidon kaj amon “Ne pro l’ deveno nobla kaj nobela / Nek pro la sang’ de l’ cara dinasti” sed pro la versoj kiuj “kuracos la turmentojn de l’ funebro / ĝojigos l’ koron de la feliĉul”.

* * *

En ĉambroj estingiĝis lum',
Aromo fluis roza...
Ni sidis benke, sub ombrum'
De la betul' branĉoza.

Duope junis vi kaj mi!
Feliĉis ni senlime
Per la printempa idili';
Ni amis tut-anime!

Al ni direktis la krescent'
Dukorna sian brilon;
Ke ne rompiĝu la silent',
Retenis mi babilon;

Okulojn bluajn vi sen vol'
Mallevis en kvieto:
Pli elokventas, ol parol',
La mut-dialogeto.

Mi ne konfesis en real',
Pri kio kor' sopiris,
Sed tion kante najtingal'
Anstataŭ ni eldiris.

(1883)

* * *

Se volvas per malvarma ondo
Min la monduma vant' sen cel' –
Min stele gvidas tra la mondo
La amo kaj la bel'.

Al ili ĵuris mi fervore
Kaj ĉiam restos en fidel':
Varmigas amo min enkore,
Ĝi – mia viv' kaj hel'.

Sen lac', sen pigro, sen enui,
Kuraĝe al la sankta cel'
Impetas mi, por surgenui
Antaŭ eterna bel'.

(1887)

* * *

Ho, ne rigardu min tiel explore!
Koren ne gapu al mi sen diskret',
Scii penante, mi kion enkore
Gardas ĵaluze en pia sekret'.

Sentoj ekzistas malklaraj: envorte
Ilin ne povas esprimi parol';
Tial do ili regadas nin forte,
Ĉar la sekret' restas for en izol'.

Ho, ne koleru, se mi tuthezite
Antaŭ vi mutos kun ŝrumpa statur':
Kaŝas ĉielo post nuboj evite
Sian profundon de pura lazur'.

(1888)

* * *

Aĥ, tiu nokto belas en sublim',
Ĝi nin instigas revii kaj sopiri,
Parolu do... aŭ vi ne povas diri,
Esprimi tutan plenan de l' anim'?

En tia nokt' ne eblas regi sin
El brusto kor' impetas malgraŭ volo!...
 Silentu, ja senpovas la parolo
 Antaŭ tioma ĉarmo kaj fascin'.

(1890)

Pri la tradukinto

Valentin Melnikov (Валентин Викторович Мельников; prononcu: Valen-tín Mélnikov) naskiĝis la 18an de julio 1957 en Moskvo. Li studis en la Moskva Kemia-Teknologia Instituto D. I. Mendelejev kaj en 1980 diplom-iĝis kiel kemiisto-teknologo, tamen poste laboris ĉefe kiel komputisto, kaj en la malfacilaj 1990aj jaroj – eĉ kiel biletkontrolisto en busoj. Li plu loĝas en Moskvo.

Li lernis Esperanton aŭtodidakte en 1982 kaj realigis sin en Esperantujo kiel poeto, tradukanto, redaktoro kaj kritikisto. Liaj originalaj kaj tradukitaj poeziaj verkoj aperis en la libroj *La birdo Gamajun* (1989), *Moskvaro* (1998), *Lena...* (1998), *Mondoj* (2001), *Liro* (2003), *Moskvaj sonoriloj* (2007), *El om-bro* (2008), *Verdeskaj pensoj* (2009), *Abritus* (2016), *Belarta rikolto* (2016), *Poezio el ĉiuj ĉieloj 4* (2017), *Poezio el ĉiuj ĉieloj 5* (2019) kaj en multaj Espe-rantaj gazetoj. Atentindas liaj satiraj poemcikloj *Socia moralo* kaj *Observoj de biletkontrolisto*, ankaŭ la lirika ciklo *Sonetoj al mia Muzo*. Iam furoris lia traduko de la maldeceta poemo *Kojonov Luĉjo* (1995). Li tradukis kelkajn novelojn de Anton Ĉeĥov kaj Lev Tolstoj, faris la plej plenan kaj preci-zan Esperantan tradukon de la versromano *Eŭgeno Onegin* de Aleksandr Puŝkin (Sezonoj, 2005), kaj tradukis plurajn verkojn de rusaj klasikaj poetoj en la ciklo *Rusa Antologio*, kiu aperadis en *La Ondo de Esperanto* de 2007 ĝis 2015. Krome, li verkis grandan artikolon pri Esperanto, kiu aperis en la multvoluma ruslingva *Porinfana enciklopedio* (1998).

Valentin Melnikov estis longtempa redakciano de *La Ondo de Esperanto* (ĝis 2020), kaj antaŭe estis redakciano de *Ruslanda Esperantisto*, *Moskva Gazeto kaj Survoje*. Redaktoro de *Cerbe kaj Kore* (1998-2000). En 2019 li iĝis membro de la Akademio de Esperanto.

Krom Esperanto, lia ŝatokupo estas intelektaj ludoj. Li iĝis ĉampiono de Ruslando en 2006 kaj ricevis la trian lokon en la monda ĉampionado (2003) pri la ludo “Kio? Kie? Kiam?”, plurfoje sukcese partoprenis televidajn ludojn “Brain-ring” kaj “Propra ludo”. Lia filino Nija estas denaska esperantistino.

Aleksander Korjenkov

Enhavtabelo

Aleksander Korĵenkov. Antaŭparolo.....	4
Miĥail Lomonosov.....	5
“En popla ombro promenante, formiket’...”	6
“Du Astronomoj venis kune al festen’...”	6
Versoj, verkitaj dumvoje al Peterhof, kiam mi en 1761 veturis por peti subskribi privilegion por la Akademio, provinke multfoje pli frue la samon....	6
Aleksandr Sumarokov.....	8
Strigo kaj rimulo.....	9
Epigramoj.....	9
“Ŝi forte amas vin, kaj vin obeas ŝi...”	9
“Ŝi estas via nun, sed ja ne por ĉiam’...”	10
“Tutkore amas mi, kaj brilas en pasi’...”	10
“Milon’ por longe de l’ edzino forveturis...”	10
“Vidvino plendis pri ofendo de l’ honor’...”	10
Gloro.....	11
Vulpo kaj dornarbusto	11
Miĥail Ĥeraskov	12
“Agordas liron iuj...”	13
Oro.....	13
Ippolit Bogdanoviĉ.....	15
Mono.....	16
Jen signo de malbon’	16
Modereco	17
Pri memlaŭdado.....	17
Pri malicdirado	17
Versoj pri amikeco	17
Gavriil Derĵavin	19
Regulo por vivi.....	20
Pri laŭmoda spirito de la jaro 1780.....	20
Monumento.....	20
Al mi mem.....	21
Riĉeco.....	22

Vasilij Ŝukovskij	23
Amikeco	24
Epitafo al lirika poeto	24
Epigramo	24
Al ŝi	24
Morto	25
Epitafo al luksulo	25
La granda penso	25
Al la portreto de Goeto	26
Rememoro	26
Venkanto	26
Konstantin Batjuŝkov	28
Mia genio	29
Vekiĝo	29
Pjotr Vjazemskij	31
Al la portreto de bombasta poeto	32
Epitafo	32
Du hundoj	32
Batita hundo	32
Homo kaj papilio	32
“Aspekton de Femido kial, artemuloj...”	33
Lango kaj dentoj (orienta apologo)	33
Jevgenij Baratynskij	34
“Disiĝis ni; la ĉarmo kaj admiro...”	35
“Komence penso trovas sin...”	35
“Konstante en purpur’ kaj oro...”	35
Plendo	36
Nikolaj Jazykov	37
Muzo	38
Preĝo	38
Elegio	38
“Ve! Konvinkiĝis mi decide kaj tutcerte...”	39
Romanco	39
Aleksandr Puŝkin	40
Al Ĉaadajev	41
Malliberulo	41
Al la vartistino	42
“Kartvelajn montojn kovras noktkurten’...”	42
“Mi amis vin. Kaj mia am’, envere...”	43
“Ermitoj piaj, kaj la inoj ĉaste helaj...”	43
Miĥail Lermontov	44

Al stulta belulino	45
Stancoj	45
Kial	46
Enuo kaj tristo	46
Fjodor Tjutĉev	47
Al N. N.	48
Problème	48
“Sur la ĉielo helas fuma stri’!...”	49
“Senpovas ni je antaŭsci’...”	49
Nikolaj Nekrasov	50
Vanjka	51
“Ne scias mi eston de homoj ceteraj...”	51
Elegio	52
Aleksej K. Tolstoj	54
Saĝo de l’ vivo	55
Kozjma Prutkov	60
Junkro Ŝmidt	61
La paŝtisto, la lakto kaj la leganto	61
Katerino	61
Afanasij Fet	63
“Bildo rav-serena...”	64
“Ŝtorm’ en ĉielo vespera...”	64
“Mia vitej’ transfenestre kreskadas plej bele...”	64
“Ĉio bruas en viv’ multkolora...”	65
“Per kora sango skibatas al vi ĉi asertoj...”	65
Jakov Polonskij	66
Vespero	67
“Aĥ, sur balkon’ – tia belo, karulo! rigardu: en for’...”	67
“Mia kanto, por flui je larĝa torent’...”	67
“Atingis la deksesan jaron...”	68
Aleksej Pleŝĉejev	69
Elegio	70
Post legado de ĵurnaloj	70
Naskiĝlande	71
“Savitas jam laŭ via volo...”	72
Ivan Nikitin	73
Kampo	74
Al N. D.	74
“Amik’, ne ploru! Multas tristo...”	75
“Dum Nevo pompa en border’ granita...”	75
Al la infano	76

Apollon Majkov	77
Al Priapo	78
Penso	78
Epigramoj.....	78
“Hirundet’ alflugis...”	79
“Feliĉo?... ”	79
Konstantin Romanov.....	80
“En ĉambroj estingiĝis lum’...”	81
“Se volvas per malvarma ondo...”	81
“Ho, ne rigardu min tiel explore!...”	82
“Aĥ, tiu nokto belas en sublim’...”	82
Aleksander Korĵenkov. Pri la tradukinto	84
Enhavtabelo.....	85

Virtuala Biblioteko de Sezonoj

Nº1. Aleksandr Puŝkin. *La pika damo.*

Tradukis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 30 paĝoj.

Nº2. Anton Ĉeĥov. *Sveda alumeto.*

Tradukis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.

Nº3. Edgar Allan Poe. *La falo de la domo Usher.*

Tradukis Edmund Grimley Evans.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.

Nº4. Fjodor Dostojevskij. *Blankaj noktoj.*

Tradukis Grigorij Arosev.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 48 paĝoj.

Nº5. Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj.*

Tradukis William Auld.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 168 paĝoj.

Nº6. Harry Harrison. *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato.*

**Tradukis Reinhard Fössmeier, Edmund Grimley Evans,
Rob Helm, Konrad Hinsén, Pierre Jelenc, Jorge Llambías,
Kevin Schoedel, Mark Weddell.**

Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 195 paĝoj.

Nº7. Nikolaj Gogol. *Palto.*

Tradukis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 35 paĝoj.

Nº8. Aleksander Korĵenkov. *Fjodor Dostojevskij en Esperanto.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 33 paĝoj.

Nº9. Charles Dickens. *La postlasitaj paperoj de la Klubo Pikvika.*

Ĉapitroj 1–7.

Tradukis William Auld.

Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 121 paĝoj.

Nº10. Aleksander Korĵenkov.

Unu Ringo ilin Regas: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto.

Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 22 paĝoj.

№11. Georges Simenon. *Maigret hezitas.*

Tradukis Daniel Luez.

Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 142 paĝoj.

№12. Miĥail Lermontov. *Princidino Mary.*

Tradukis Nikolaj Danovskij.

Kaliningrado: Sezonoj, 2014. 86 paĝoj.

№13. L. M. Zamenhof. *Kongresaj paroladoj.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2015. 64 paĝoj.

№14. Aleksandr Saĥarov. *Superforta ambicio.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2017. 31 paĝoj.

№15. Valerij Brjusov. *Kvar noveloj.*

Tradukis Grigorij Arosev, Aleksander Korĵenkov, Ilsa Novikova.

Kaliningrado: Sezonoj, 2018. 33 paĝoj.

№16. *Orienta Almanako.*

**Tradukita el la araba, armena, ĉeĉena, hebrea, hinda, ĥina, japana,
kartvela, lezgina, sanskrita kaj tatara lingvoj.**

Kaliningrado: Sezonoj, 2018. 80 paĝoj.

№17. *El la rusa poezio.*

Tradukis Valentin Melnikov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2020. 90 paĝoj.

Nia elŝutejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>